Esperanto — Rok — Fangazeto


ROK gazet'

TEKSTOJ
NOVAĴOJ
INTERVJUOJ
KONCERT-FESTIVALOJ
REPORTERAĴOJ
E-ROK-TERMINARO
MALROKMUZIKO
ANONCOJ
ESPERANTO ROK-RETO
NOVAJ DISKOJ-KASEDOJ









Eldonas EUROKKA
EUROKKA - F-31450 DONNEVILLE

NUMERO 3
Jaro 1992



Abono: 4 numeroj
por 26 IRKP aŭ
100 FRF
35 NLG
20 USD
16 EKU

Rok-Gazet' n-ro 3

Administration-rédaction/
Administrejo-redaktejo/
Rok-Gazet' c/o EUROKKA
F-31450 DONNEVILLE
TEL (33)61.81.95.65

Directeur de publication/
Eldon-direktoro:
Floreal MARTORELL

Rédacteur en chef/
Ĉefredaktoro:
Bertrando ALBAULT
Berdoulet Ouest
FONTENILLES
31470 St-LYS
(33)61.91.16.34

Rédacteurs/
Redaktora stabo:
* FLO *
Marcelo REDOULEZ
Bertilo WENNERGREN
Rikardo CASH
Oleg SVIRSKIJ
Vladimir SOROKA
Jurij PASEĈNIKOV
Rafael BLANCO
Seán OSBORNE
Sonja TIĤOVA
Nikolao VOLOŜIN
Drasutis POCKEVICIUS
Fabienne BERTHELOT
Stéphane DUPIN
Andrzej BRODA
LEO
SABRINA
J.P. MOYA
Dominique BINCHE &
Kim HENRIKSEN

SAISIE/ ENKOMPUTILIGIS:
Bertrando
Bertilo
Marcelo
RoKo

PAO, TIRAGE LASER/
PKP, LASERPRINTADO:
Philippe GERLAND

Secrétariat/
Sekretariino:
Sylvie BAUDIN
Pascal PARAPEL

Dessins/Desegnaĵoj:
Kruela DEVIL
Niko
JMB
Frederok'

Photos/Fotoj
Flo MARTORELL
Sylvie

MAQUETTE/ENPAĜIGO:
Phil
Flo
Marcelo
Bertilo

Imprimerie/presejo
CRYSTAL CREATION
F-31450 DEYME

Distribution/disdono
Associations Espérantistes
Esperantistaj Asocioj

Dépot légal à parution
Commission paritaire en cours
Édité par/Eldonas
EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE



Oficiala Klaĉado

Kiel vi ja certe jam komencas alkutimiĝi, jam ses pliaj monatoj trapasis kaj forpasis... Mi ne provos ĉifoje eniri la varman buljonon, ĉar tia ĝi evidente ne estas: neĝo falas kaj buljono glacias... frostotremante mi sendas al vi ĉiuj varmegajn bondezirojn por la nova jaro.

Mi opinias ke Flo nun sukcesis plej taŭge elstudi minimuman abontarifon por Rok-Gazet'... Serĉu ĝin sur tiu ĉi paĝo, trovu ĝin, pristudu ĝin kaj profitigu nin pri viaj reagoj... ne forgesante aboni mem! Abonigu ankaŭ amikojn, amikinojn, familiojn, idojn, praidojn, patrojn, patrinojn, avojn avinojn, praavojn, praavinojn kaj aliajn... Ankaŭ eblas donaci abonojn.... eĉ al ni mem se vi tion deziras!

Ĉiuokaze abono validas por kvar numeroj, ne por unu jaro!

En la numero unu, mi petis al komputilantoj prefere sendi siajn verkojn sur diskedoj 3.5" en ASCII sliparo(j), laŭ Atari aŭ IBM formato. Mi daŭre tion petas, sed, aldone, mi proponas sendi virgan diskedon al bezonantoj... Ĉiukaze ni resendos viajn diskedojn.

Ek de tiu ĉi numero Rok-Gazet' estas komplete verkita per komputiloj: unue la plej teda parto, enkomputiligi ĉiujn artikolojn kaj ilin korekti kiel eble plej (sed ĉiam io eskapas al niaj tro lacaj okuloj!)... due perkomputile enpaĝigi la aferon... Ĉio estos ek de nun surpaperigita per lazer-printilo, krom desegnoj kaj fotoj pri kiuj ni zorgos kun la presisto...

Ĝis nun ni faris plurajn provojn pri komputile helpata eldono, sed rezultoj tre diversaj neniam atingis vere taŭgan aspekton. Mi do esperas ke tiu ĉi numero finfine atingos la kvaliton al kiu ni strebas de l' komenco de Rok-Gazet'!

La ĉefredaktoro, Bertrando

Fotoj sur la antaŭa kovrilo:

La Mevo:	Ono Takao
Amplifiki:	Mikke, Ewa, Bobby Juhani, Olle
Tutmonda muziko:	Karin Rossov & Rainer Conrad



Anonctarifoj

Dorskovrila anonco:	2000FRF/400USD
la interna paĝo:	1000FRF/200USD
1/2 paĝo:	600FRF/120USD
1/4 paĝo:	300FRF/60USD
1/8 paĝo:	200FRF/40USD
1/16 paĝo:	100FRF/20USD

50% rabato por Esperanto Rokbandoj.

Anoncetoj:
Ĉiu linio kostas 6FRF/1,20USD aŭ 2 IRKP

LUEK

Pagmanieroj

IRKP-oj (Internaciaj Respond-Kuponoj)

Bankkonto
Eurokka (Asso Esperanto-Rock) B 15999 G 2206
N° C 40247960 CL 10
CCM Toulouse St-Agne
F-31400 TOULOUSE, FRANCIO

UEA Konto
kodo: Rokk-b

Landaj Kotizperantoj

Aŭstralio
Libroservo de AEA
P.O. Box 230, Matraville
N.S.W. 2036, Aŭstralio

Argentino
Atiljo Orellana-Rojas
Argentina Esperanto Asocio
C.C1428,
RA-5000 CORDOBA

Brazilo
Brazila Esperanto-ligo
CX.Postal 11-1105
' BRASILIA-DF
BR-70084 BRAZILO

Britio
EAB
140 Holland Park Avenue
LONDON - W11 4UF

Bulgario
Ilija ANDREEV, pk. 120,
BG-9700 ŜUMEN

Ĉeĥio
Ĉeĥa Esperanto Asocio
(junulara sekcio)
JILSKA 10
CS-110 01 PRAHA 1

Hungario
Lingvo
Szolgaltato Iroda
PF. 87
H-1675 BUDAPEST

Portugalio
Portugala
esperanto-asocio,
rua Dr.João Couto
N°6 R/C.-A
P-1500 LISBOA

Ukrainio
Niko VOLOŜIN
?-263018 UKRAINIO,
LUCK-18, a.k.26

Usono
ELNA, P.O. box 1129
El Cerrito
CA 94530
USONO

Enhavo

Kolofono, abonoj, anonctarifoj kaj aliaj oficialaĵoj **2**

ATENTU MUZIKAMULOJ
Finfine jen ĝi! En Stokholmo! **4**

INTERVJUOJ
Mikke Englund **7**
Bikini **8**
Dazibao **10**

MALROKMUZIKO
Internacia Esperanto Ĥoro **18**
Bonan tagon la paco **19**
Esperantista kontratenoro **19**
Eks-sovetaj muziksteloj **20**

REPORTERAĴOJ
Arkones **5**
5a I.J.S. **5**
Roko en Karlskoga **6**
Internacia E-festivalo en Parizo **6**
Koncerto de Dazibao **12**

ROK-BANDOJ **25**
Kredo
Litova rokmuziko
Rokanoj alien!
Solo
Torino

TUTE NE GRAVAS **21**
Pri "trovaĉaĵoj" kaj aliaj
Malmilito

KRITIKLOJ
T.M.: *Freŝa blovo el germanio* **13**
Amplifiki: *Ĉu ne* **14**
La mevo: *Bluo* **14**
Persone: *En la speguló* **15**
Kajto: *Procesio multvalora* **16**

NOMOJ DE MUZIKSTILOJ **23**
ROKOMONDO **17**
Eksterordinara muzika kongreso **22**
ANONCOJ kaj RADIOJ **26**
Pliaj maŝoj por la RETO **27**



Legenda:
& resendas al la Reto en ĉi numero
@ resendas al la Reto en antaŭaj numeroj
X)pp resendas al n X paĝo pp

SENILUZIIGOJ KAJ ESPEROJ

Post longa daŭro, jen finfine *Rokgazet'* n-ro 3.

Vi jam scias ke *Rokgazet'* ne havas precizajn aperdatojn, kaj tio pro diversaj kialoj:

- Materialo kiu alvenas nek regule nek akurate.
- Novaĵoj kiujn indas aperigi lastmomente.
- Solvoj por netranspagpovaj landoj ankoraŭ ne trovitaj (ĝis nun ni sendis al ili senpage).
- Financaj problemoj pro manko de abonantoj.
- K.t.p....

La esperantistaro seniluziigis nin pro ĝia apatio kaj malfidemo.

Rimarkindas ke malmultaj revuoj por Esperanto-junularo ekzistas, kaj ni miras ke eĉ tiel malmultnombraj ili ne havas pli da subteno.

Eble la E-movado atendas ke ili malaperu por diri: Ho jes, ili estis subtenindaj; sed tro malfrue. Ofte kaj preskaŭ ĉiam oni tro malfruas pri tiuj aferoj.

Mi ne diras tion nur ĉar ni eldonas *Rokgazeton*, sed ĉar la E-junularo bezonas revuojn por si mem en kiu ĝi trovas interesaĵojn kiuj utilas ankaŭ por pliinteresigi novajn junajn E-lernantojn, kaj kiel vi jam certe scias, tro da mono ĉe gejunuloj maloftas.

Laŭ mi – kaj kalkulu –, E-revuoj por junuloj estas tiom malmultaj ke ili estas subtenendaj, kvankam kelkaj membroj de TEJO pensas la malon kaj diras ke TEJO ne povas subteni ĉiun gazeton kiu povas interesi junulojn. Mi esperis ke TEJO estas junulara organizo.... Cetere, EUROKKA fariĝis fakasocio de TEJO.

Tamen ekzistas esceptoj kaj indas ke ni daŭrigu por ili malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. Pro tio ni dankas ĉiujn niajn abonantojn, la E-muzikgrupojn kiuj daŭre ĉiel helpas nin, kaj ankaŭ la presiston kiu glatigis la aferon por ĉi tiu numero.

Finfine antaŭ vi staras *Rokgazet'* n-ro 3, plenplene de espero kaj ĝojo ĉar multaj pozitivaj informoj alvenis por ni ĉiuj.

La Esperanto-kulturo pli kaj pli riĉiĝas.

Novaĵoj de **Persone**, **Kajto**, **La Mevo**, **Amplifiki**, tutlaste **Tutmonda Muziko**, ktp., montras ke ni povas sen timo ekvidi estontecon serene, almenaŭ tiurilate.

Ni povas vidi ankaŭ ke pli kaj pli da Esperanto-aranĝoj pretigas Esperanto-kulturprogramojn kun E-rok-, pop-, kaj folk-muzikgrupoj.

Kiel ekzemple niaj amikoj italaj, germanaj, katalunaj, parizaj, bordozaj, ktp.

Ni kuraĝigas tiujn iniciatojn ĉar tio vivigas nian lingvon kaj ĝian kulturon.

Ni devus atingi la punkton je kiu E-aranĝo ne okazus sen E-kulturprogramo - hontindaj tiuj kiuj provus aliel fari.

Dungi E-muzikgrupojn plikreskigos ilian kvanton, diversecon, kaj kvaliton.

Organizu koncertojn, turneojn, festivalojn, ktp.

Pripensu la aferon, petu informojn al tiuj kiuj jam havas sperton, funkciigu vian korespondemon per la E-rokmuzikreto.

Konatigu ĉirkaŭ vi *Rokgazeton*, abonigu ĝin se vi pensas ke indas, fariĝu *Rokgazet*-peranto en via lando.

Por fini, petu al ni la kased/disk-distribuan katalogon de **Vinilkosmo** kaj konatigu la kasedojn kaj diskojn de ĉiuj E-muzikgrupoj, tio veturigas Esperanton pli ol kio ajn (kaj vi scias ke «kio ajn povas okazi kiam ajn»).

Ne imageblas ke ĉiu esperantisto ne havu en sia diskoteko ĉiujn novaperintajn E-rok-, pop-, folk-muzikproduktaĵojn.

Kiel sen tio ili povus varbi por Esperanto?

Ne penseble, ĉu ne?

Reagu kaj Roku!

Kaj jen niaj elkoraj kaj elrokaj bondeziroj por nova roka jaro! **Flo!**



Atentu Muzikamuloj! Dua elstara evento okazis!

PARTO 1 (inter ondoj)

Rolas: kamarado Bravado kaj sinjoro Minoro

Kamarado Bravado, laca pro longa kurado sed triumfanta kiel maratonano post 42 km, aperas sur scenejo, kie staras lia amiko sinjoro Minoro, profunde meditanta.

- DUA ELSTARA EVENTO OKAZIS!!! - *feliĉe elkrias li, sed tuj stumblas kaj smaĉe falegas flanken (nu, ĝuste kiel maratonano). Tiun ĉi malsupreniĝon akompanas sonoj de falantaj el liaj poŝoj bagatelaĵoj - kombilo, krajono, agendo, kondomo, blovharmoniko ktp.*

Sinjoro Minoro, ne lasante sian meditemon, vitre rigardas al kamarado Bravado, kiu surgenue vigle kolektas siajn trezorojn.

- SED KIO ESTIS LA UNUA??? - *malrapide prononcas li, levante rigardon al la plafono (ĉiama memorŝranko) ... Liaj okuloj iĝas kvadrataj, frunto sulkiĝas, sur genuoj ekemerĝas ŝvito.*

- **DO KIO ESTIS LA UNUA ???** - *denove kaj denove ripetas li. Publiko, sidanta en la unuaj vicoj, povas aŭdi kiel krakas liaj cerbaj kurbaĵoj sub pensa tensio.*

- Ĉesu klaŭni - *ŝtopas silenton Bravado, ŝovante juvelaĵojn al la poŝoj kaj purigante pantalonon* - Vi, ja, bone scias, ĉu ne? - *Li komplote rigardas al spektantoj.*

Spektantoj kompreneble scias, tamen silentas. Por ne rompi la ludon. Ankaŭ silentas sinjoro Minoro.

- Bone. Mi provos de alia flanko - *rekomencas Bravado ĉirkaŭirante amikon.*

- ĈU VI SCIAS KIU MALFERMIS NOVAN E-MUZIKAN EPOKON?

La vortoj pendiĝas sur magraj oreloj de Minoro kiel pendoglacioj.

- Antaŭ duonjaro - *tuj aldonas Bravado, observanta kun timeto ĉi fizikan procedon.*

En tre bone lumigita scenejo publiko klare vidas kiel okuloj de Minoro iĝas diesformaj.

- Ho, kia honto! Kiel eblas forgesi tiun, kiu helpis nin ĉiujn trovi unu la alian?

Kamarado Bravado levas sian manon direkte al la publiko, mem iĝanta simila al granda demandsigno. Krome, lastajn vortojn li parolas ne al Minoro, sed ĵetas ilin al spektantoj, kvazaŭ riproĉante aŭ suspektante iun el ili.

Homoj nervoziĝas. Iu, aŭ ne tolerante streĉon, aŭ kompatante turmentojn de povra Minoro feble krias - Rok-Gazet'.

- Jeeees!!! - *radioj de feliĉo tuj gajigas vizaĝon de Bravado kaj li kiel perfekta iluziisto aperigas al ĉiuj freŝan numeron de Rok-Gazet'. Post kurta multsignifa paŭzo lia gaja voĉo kun nova forto galope ekdancas sur kapoj de aŭskultantoj.*

- Jeeen!!! - *Eksplodas li, svinganta per fama revuo kvazaŭ dirigentas orkestron kiun vidas nur li mem.*

- JEN - ESTAS TIU UNUA ONDO EN LA MARO DE MUZIKAJ OKAZINTAĴOJ, KIUJ BALDAŬ INUNDOS ESPERANTUJON ! ! !

Spektantoj retenas la spiradon.

Sinjoro Minoro eksidas sur la seĝon kaj levas krurojn.

- kaj, se unua ondego pasis - *daŭrigas Bravado tremkulmine, do nun venas la dua kaj li levas la manon kun Rok-Gazet' kvazaŭ montrante direkton de kie tiu ondo venas.*

Homoj poiomete haste lasas siajn lokojn.

- Prepariĝu!!! - *kariljonas lia voĉo super komenciĝanta kaoso* - Enspiru la aeron kaj atentu. Jen ĝi aperas! - *lia fanatika rigardo plenigas la halon per iu mistera sento* - Jen ĝi..!!! - *Aŭgure tertremas lia parolo...*

Paniko en la halo. Infanoj ploras. Plenkreskuloj rampas, kuras, strebas al elirejo, faligante la seĝojn kaj unu la alian. Iu krias - Boatoj akven!... - *Preĝoj, ploroj, krioj, unuvorte totala malordo kvazaŭ dum "lastaj tagoj de Pompeo". En mezo de scenejo forfluanta de la seĝo svenas sinjoro Minoro.*

- Do kio ĝi estas? - *Apenaŭ aŭdeblas lia voĉo.*

Fulmotondra lasta akordo de Bravado profete finas la uverturon.

- ĜI ESTAS FILANTROPIA MUZIKA STUDIO !!!

Muta epizodo (el "Revizoro" de N.Gogol) * *Kurteno.*

Dankon, kamarado Bravado. Dankon, sinjoro Minoro. Dankon al publiko, al Gogol. Nun mi daŭrigos mem.

* *signifias, ke ĉiuj ŝajnas frostigitaj kiel glaciaĵoj en fridujo.*

PARTO II (Vivu esceptoj al reguloj!)

Jes, kamarado Bravado, vi pravas! Ĝi estas filantropia E-muzika studio, kiun mi kun Oksana naskis finfine la sesan de junio 1991 en Stokholmo, kaj uzante nian gepatran rajton modeste nomis "Pigo studio". Vere, ĝi iĝis por ni kiel infano, ja laborego por ĝi daŭris dum du jaroj. Nun ĝi aperis kaj estas vi unua, kiun mi informas pri tio. Studio situas perfekte - 12 minutoj per metroo de la urbocentro, en tre trankvila loko - minigolfo, besto-ĝardeneto, parko, herbo, lokustoj...AH!

- Ĉu efektive Svedio?! - *Kun plorantaj okuloj flustras vi - Ĉu efektive Stokholmo?!!!*

- **JEEEEEESSS !!!!** Kaj ankoraŭfoje - Jes, jes, jes. Ĉarma Stokohlmo kun ĉiam verdaj Ranetoj, Persone, Amplifiki, Mirinda Stokholmo, kie eĉ Pigoj kvakas, ŝajne intencas kvakigi tutan Esperantujon, proprigante nian studion. Kaj se vi ekmemoros la perfektajn KEFojn (denove Ranetoj!) vi komprenos - Stokholmo iĝas E-muzika centro. Sendube.

Kamarado Bravado - Kiu diras "ne"?

Kamarado Minoro - Neniu.

Bone, mi daŭrigas. La studio troviĝas en kelo kaj konsistas el tri malgrandaj ĉambroj kaj eta gastejo, kie vi facile trovas gravajn angulojn - necesejo, kuirejo, stokejo kaj duŝo.

Sinjoro Minoro - Ho, feliĉo! Nekredeble!! Ĉu finfine E-muzikistoj havos sian profesian duŝon?!

Kamarado Bravado - Certe! Nepre! Alie ne povas esti!

Svedio, Ranetoj, Pigoj, gratuloj, kisoj, ĉampanjo, aparataro...



APARATARO :

16-kanala angla miksilo "CMC-24", 16-kanala magnetofono (surbendigilo) "FOSTEX B-16", aŭtolokatoro "FOSTEX 4050", samplilo "AKAI MIDI S612", sonlimigiloj, kompresoroj, komputilo, mikrofonoj, stativoj, kabloj kaj aliaj studiaj validaĵoj.

KIAM?

Malgraŭ ke la studio aperis unu jaron pli frue ol mi planis, ĝi komencos labori rigore laŭplane ekde la antaŭe menciita tempo - aŭtuno 92. Aldone mi povas nur precizigi ĉi daton - 1a de novembro.

KIAL?

Ĉar por agi filantropie bezonatas kapitalo. Tio signifas, ke por registri esperantistojn senpage ni bezonas elspezi mem: ĉiumonate pli ol 10.000 svedajn kronojn por sonreĝisoro, lupago, asekuro, telefonabono.

KROME

Antaŭ oficiala malfermo mi strebos:

1) Ŝanĝi miksilon kaj magnetofonon al 24-kanala 120.000 SEK

2) Aĉeti sintezilajn cerbomodulojn por ROLAND, YAMAHA, KORG kaj pli kapacitan samplilon 80.000 SEK

KROMKROME

Antaŭ ĉi vintro mi metos al la studio ATARI komputilon kun kompleta muzika programekipaĵo 10.000 SEK

Ankaŭ necesas prepari loĝkondiĉojn por venontaj muzikistoj kaj iomete rekonstrui gastejon.

De tiu ĉi kalkulo venas konkludo, labori daŭre kaj same persiste kiel ĝis nun. Por ni tio signifas ankaŭ kiel eble plej multe enspezigi la studion antaŭ ol ĝi komencos labori filantropie.

Nur **PERSONE**, **AMPLIFIKI** kaj **MARTINS BAND**, tiuj modestaj kaj ne anstataŭeblaj MIKKE, MARTIN kaj BERTILO, sen kiuj la studio apenaŭ aperus nun - estas honoraj esceptoj al la studiaj reguloj. Do ili rajtas uzi studion ekde nun. Vivu esceptoj al reguloj!

VIVU BERTILO!

VIVU MARTIN!

VIVU MIKKE!

Bone, sed kion faru nun la aliaj? Ankaŭ uloj randaj ŝatas manĝi kandojn - aŭdiĝis voĉoj de dolĉŝatantoj.

- Mi tion scias, opinias natura, kaj senpacience atendas viajn reeĥojn. Ĉefe, viajn sonregistraĵojn (amatoraj, profesiaj, en kasedo, disko, bobeno - ne gravas). Gravas nur ke vi prezentu kantojn verkitaj originale en Esperanto. Ankaŭ estos ne malbone se vi akompanus vian sendaĵon per fotoj kaj aliaj materialoj pri vi, via arto kaj ĉio, kion vi taksas atentiga. Ju pli multe, des pli bone. Ni havas unu jaron por prepari nian agrablan kunlaboron ambaŭflanke. Bonvolu ne taksi tiun tempoperiodon tro longa. Ĝi trapasos rapide. Ne tiru ĝian voston - kontaktu nin jam nun. Ni tre atendas. Tre! Ĉu vi sentas tion?

Grandegan dankon al ĉiuj kiuj helpas nin.

Koran dankon al Pier Luigi Cinquantini (Italio) pro donaco - 1000 SEK. Apartan dankon al Lu (Tatjana Ivanova el Moskvo), Bertilo kaj Per Arne, kies helpo ne esta mezurebla. Dankon, amikoj.

PIGO



Reporteraĵoj

ARKONES La 10-aj!

Inter la 18-a kaj 20-a de oktobro 1991 kiel kutime en Poznan (PL) okazis la **10-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES)**.

La ĉefideo de la konfrontoj estas kunigi organizantojn kaj kreantojn de la Esperanto-kulturo en seminarioj, scenejoj, sinprezentoj de kantistoj, spektakloj, ekspozicioj, ktp...

En la arta programo de la ĉi-jara aranĝo Jerzy FORNAL, la aktoro de la varsovia "Teatr na Woli" prezentis monodramon pri Wolfgang Amadeus Mozart okaze de la 200-a datreveno de la morto de la Komponisto.

En la muzika parto sinprezentis interalie la Kantgrupo "Harmonio" el Smolensk (eks-Sovetio), Joanna Wróblewska (voĉo) kaj Iza Nowakowska (piano) aninoj de la Kantensemblo "ESPERO" el Koszalin kaj Krzysztof Lobacz, la nuna redaktoro de "Studenta Gazeto" de Pola Studenta Esperanto- Komitato (vidu foton ĉi-sube).

La tuta aranĝo trapasis en specife varma etoso kaj espereble ni povos renkontiĝi estonte kaj ĝui la 11-ajn, 12-ajn... Artajn Konfrontojn en Esperanto.

(Informoj pri "Studenta Gazeto" riceveblas ĉe: Joanna Wróblewska "SG", Brzowa 23 ; PL-75-136 KOSZALIN)

Andrzej BRODA



5ª Internacia Junulara Semajno

Dum la unua aŭgusta semajno okazis la Internacia Junulara Semajno, kiu de kelkaj jaroj iĝas alternativa junulararanĝo por tiuj kiuj ne povas iri al la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Pri la programo, vetero, Danub-inundo, ktp., vi certe legintos en la normala talpgazetaro. Bonaj artikoloj aperis en *GEJ-Gazeto*, *Koncize*, kaj sendube aliloke. Mi ŝatus insisteti je nur unu punkto: la bonege funkcianta trinkejo, kiu restis malferma ĝis malfrunokte (aŭ -matene, laŭvidpunkte), kaj kie ni povis kostete akiri gustegajn trinkaĵojn kaj manĝetaĵojn. Mi tie pasigis plej agrablajn horojn, babilante kun amikoj novaj kaj malnovaj - kaj pri la programeroj, bedaŭrinde, Klementin'!

Estis multe da muziko - sed plejparte malroka. Popolkantoj kaj -dancoj de Litovio, kanzonoj de Katalunio, ktp. Tre bele. Mi ĉeestis nur unufoje, ĉar la ejo estis multe tro malgranda por tia spektaklo, kaj restis apenaŭ eĉ starloko.

Ne okazis rokkoncerto. Nu ja, plurajn vesperojn oni organizis diskotekon, sed tio ne estas vivanta muziko. Nur unu vesperon ni havis vivantan rokmuzikon, dum la balo. Temas pri tre talenta hungara bando, tute adekvata por dancvespero. Ilia repertuaro iom datis - rokenrolo de la sesdekaj jaroj. **Beach Boys**, kaj kompani'. Kaj en tre bona usonangla.

Nu, mi ne estas talpo, kaj mi bone scias ke ne ĉiuj homoj sur Tero parolas esperanton. Sed ŝajnas al mi ke la ĉeestantoj de junulararanĝo rajtas postuli junularmuzikon - ja modernan rokon, kia ajn ĝi estas! Kaj en esperantaranĝo, ili rajtas postuli almenaŭ unu esperantan rokkoncerton!

- RoKo





Rokkoncerto

en Karlskoga Urbodomo dum IJK 91

En la kelo de la urbodomo, ni atendis Persone kaj Amplifiki kiuj devis tie koncerti inter la 19a kaj 20a horo. Dank' al komfortaj seĝoj la publiko ne ekscitiĝis pro la malfruega komenco de la koncerto. Dum la atendego la publiko restis trankvila babilante. Finfine je la 22a la esperanto-rokbando Persone ekludis kaj, post tre mallonga paŭzeto (ĉirkaŭ du minutoj) ekaperis Amplifiki.

La tuta spektaklo daŭris du horojn kaj duonon.

Ni pensis ke estos pli da bruo; male la muziko ne estis tre laŭta; tiel oni povis aŭdi kaj kompreni ĉion kion kantis la rokbandoj. Kaj verŝajne pro la mallaŭta muziksono mankis iom da energio kaj vigleco al ambaŭ rokgrupoj dum la koncerto.

Ne nur mankis sono sed ankaŭ lumĵetiloj por valorigi la grupojn. Nur kelkaj lampetoj lumigis la scenejon kaj dancplankon. Tiaj etoslampetoj taŭgis por la malrapidaj kanzonoj sed tute ne sufiĉis por la rokpecoj viglaj kaj rapidaj.

La teamo Persone ludas rokmuzikon kun diversaj influoj, dum Amplifiki restas tre ofte blusa. Ambaŭ grupoj ŝanĝis multe la aspekton dum lastaj jaroj. Tio signifas por Persone ke ĝi ankaŭ evoluis multe. Antaŭe ili ludis laŭ multdiversaj stiloj, sed nun ili trovis iun pli samspecan, ni diru eĉ pli harmonian stilon kiu estas tre dependa de du aferoj:

- Unue, la tre bona kunludo inter la drumoj kaj baso. Ili ludas klare kaj precize; tio tre gravas por ili.
- Due, estas la voĉo de Martin Wiese kaj lia interpreto de la ofte bontekstaj kanzonoj. (Demandu G. Kamaĉo pri la tekstoj, li ĉiam pretas prelegi pri ili.)



Persone (Anders GROP maldekstre kaj Martin WIESE dekstre)

Amplifiki prezentis al ni sian antaŭlastan kasedon (*Festoj de Kristnask'*) kaj por ĝin ilustri estis starigita antaŭ la scenejo kristnaskabio. Ili estis la pli ĵaza kaj blusa grupo de la spektaklo. Kaj estis tre agrable al ni aŭskulti la harmoniajn akordojn de la gitaro de Mikke. Nur Mikke Englund restas de la originala grupo.

Kiel ĉiam ili ludas ĉi tiun blusrokon kun iom da popo en ĝi. Estis epoko en kiu la stilo de la bando estis pli popa. Sed nun, la tuta grupo svedas kaj finfine vere orkestras (sen drummaŝino, sed kun vera drumisto). Ĝi sonas kiel bona blusrokbando.

Tio estas kaj bona kaj malbona, ĉar amaso da grupoj ludas blusrokon, kaj por esti iom konata (ekster la E-movado) necesus pli bonan ritmogrupon kaj frontfiguron. Fakte, al ambaŭ grupoj dum la koncerto mankis frontfiguron kaj personecon.

- Raportis Dominique Binche kaj Kim Henriksen.

Internacia


Esperanto-Festivalo en Parizo

La 9an kaj 10an de novembro 1991, okazis la 7a Internacia Esperanto-Festivalo en la Kulturdomo de Issy-les-Moulineaux, apud Parizo. JEFO prizorgis la trinkejon, kie la partoprenantoj povis sensoifiĝi.

La varietea flanko konsistis el recitalo de franca kantisto Ĵak Le Puil, Mikaelo Bronstein (eks-Sovetunio), kaj Kuffo (Zairo), kiuj prikantis la stultecon de milito, de malsato, kaj de la burokrataro.

Malnovajn tradiciajn instrumentojn prezentis Rita kaj Franz-Georg Rossler, ludante muzikaĵojn el la Renesanco per flutoj.

La granda novaĵo estis kreita de Eruda el Ĉinio. Ni menciu ankaŭ Andreon kaj Nataŝan el Latvio.



Kia Koincido

La teatra trupo **Kia Koincido** el Germanio interpretis *Puphejmon* de norvega verkisto Ibsen. Rimarkinda estis la rolo de Judith Bormann, kiu ludis la infanvirinon.

La dua teatra trupo, **La Krizalido** el Francio, traktis feinan rakonton.

La spektaklo finiĝis per koncerto de rokmuziko: la grupo **Rozmariaj Beboj** kuntrenis entuziasman publikon en grandan rondon de plurlingvaj kanzonoj, interalie en Esperanto.

Libroservon kun pli ol 300 verkoj prizorgis Louise Marin.

Ni notu ankaŭ la literaturan forumon, kiu pritraktis la temon «Kien la poezio?», kaj la lanĉon de *Franca Antologio*, trivoluman antologion de la franca literaturo, kiu kronis la tuton okaze de tiu festivalo.

-- Stephane Dupin

Ankaŭ mi parolu iom pri la etoso. Mi jam venis tien ĉi antaŭ du jaroj. La publiko estis la sama, ĉefe franca, pariza, malpli provinca, sed ĉi-jare mi kontentige renkontis multajn JEFO-anojn kaj junajn eksterlandanojn, inter kiuj kompreneble estis la junaj tre talentaj aktoroj de **Kia Koincido**, nun tre konataj. Min denove mirigis tiuj talentuloj kiuj tre valorigis la festivalon. Teatrumi grupe sen loĝi en la sama lando estas talento!

Certe pli surprizis niajn veteranojn la apero de Tufuene Mafuila kaj *Rosemary's Babies*, kiuj viglegigis la spektaklejon. Mi eĉ vidis kelkajn fuĝi la megafonojn terure «rokajn»! Sed tiu miksaĵo inter teatro, poezio, muziko renesanca, kanto, kaj roko, estis bonega. Ĉiun jaron aperas ŝajne nova talento en tiu festivalo. Venu venont-foje!

- Fabienne Berthelot.



intervjuoj

Vi estas Mikke ENGLUND, ĉu ne?

Bertrando: *Mikke, vi restas La Gitaristo de AMPLIFIKI, fama esperanto-rokbando. Ĉiuj scias, ke la grupo surbendigis unuan kasedon antaŭ kvin jaroj... Kial fari, nur nun, kvaran kasedon?*

Mikke: Estis tri jaroj inter la unua kaj la dua, kaj tio estis io kion mi ne ŝatis; mi pensas ke spaco de unu jaro inter kasedoj estas sufiĉe bona spaco... Mi estas la nura persono kiu restas el la origina grupo ĉar tio estas kombino de hazardo kaj fakto ke mi, dum tuta tempo, estis aktiva Esperantisto.

B: *Kiu ne sentos ioman perfektigon inter tiu kasedo kaj antaŭaj verŝajne jam estas surda! Kiel klarigi tion, kaŝante ke ĝi estis surbendigita en Pigstudio kaj samtempe en via gepatra lando? Ĉu konkludi ke Esperanto ree konus landlimojn?*

M: Estis la grupo mem kiu registris kaj miksis ĉion de la kasedo "Ĉu ne?". Kun la antaŭaj kasedoj, ĉiam estis kompromisoj inter grupo kaj teknikisto kaj miksisto. Tiuj personoj de la studio sufiĉe malbone konis tion kion ni volis fari: ili ofte havis proprajn ideojn kiuj taŭgas por kelkaj grupoj, por kelkaj ne. Honeste, mi estis ĝenerale malkontenta post registrado de la aliaj kasedoj. Mi ne dirus ke Pigostudio estus pli bona ol la aliaj studioj kie ni surbendigis, nek pli malbona, sed tie ni sentis veran trankvilecon kaj eblon fari kion ni volis fari, ekzemple se la drum-sono ne plaĉis al ni, ni prilaboris tion ĝis ĝi sonis bone. Mala ekzemplo estis surbendigado de kasedo "Esperanto ne konas landlimojn" kie ni entute ne havis eblecojn por iel eksperimenti. Tamen, ni atingis ankaŭ tiam kelkajn bonajn rezultojn, sed kun iom pli da tempo, ĝi povus esti multe pli bona.


B: *Laŭ vi kiun influon ŝuldas "Ĉu ne?" al "Destin" de nia amiko Vladimir?*

M: Honeste, mi aŭskultis ĝin du-foje, nur, kaj mi komplete ne memoras muzikon, sed iel li inspiris min kun liaj efektoj, inter kantaĵoj. Tio, almenaŭ en lia disko, vivigis la etoson.

B: *Mi ne memoras ke iu iam kuraĝis demandi kaj skribi pri la deveno kaj signifoj de la nomo Amplifiki... Vi kuraĝos respondi, ĉu ne?*

M: Mi kuraĝus jes, sed pli bone demandi al la du kreintoj de la nomo, Kim Henriksen kaj Bertil Wennergren...

B: *Laŭ vi, kion valorus recenzo de rokmuzikalbumo kiu kontentiĝus kritiki la tekstojn?*



Mikke kaj Ewa

M: Por kelkaj artistoj sendube la tekstoj estas tre gravaj, ekz. tiu rusa kantisto Visocski evidente uzis muzikon kiel malantaŭaĵo por subteni la tekston de liaj kantaĵoj. Tiam recenzo de teksto estas nepra sed estus erare emfazi muzikon en recenzo. Sed ĝenerale en la muziko de hodiaŭ la tekstoj havas la duan rolon. Plej ofte la muziko mem esprimas la diversajn sentojn, ekzemple nervozeco aŭ trankvileco, gajeco aŭ malo, ktp. ktp. ktp... De nia lasta kasedo mi malŝatus recenzon kiu nur pritraktus la tekstojn.

B: *Mikke, neniam oni parolas pri vi mem! Mi certas ke multaj legantoj de Rok-Gazet' ŝatus scii iom pli pri tiom fama gitaristo... Kiu fakto en via vivo decidigis vin lerni Esperanton kaj gitaron?*

M: Kiu fama gitaristo?

B: *Iu nomata Mikke Englund!*

M: Fakto estas ke, ĝis nun, neniu venis al mi por diri "Mi aŭdis vian lastan kasedon kaj mi tre ŝatis la gitarludadon!". Honeste tio neniam okazis, mi eĉ pripensis kelkfoje ŝanĝi instrumenton ĉar mia konkludo povus esti ke homoj simple ne rimarkas la gitaron. Mi komencis mian Esperantan vivon antaŭ dek jaroj pro mia amiko Bertil Wennergren kiu bonkore enkondukis min al nia eta agrabla mondo, tamen vasta. Sed gitaron mi ludas ek de antaŭ dudek jaroj. Fakto estas ke tuj kiam mi komencis ludi gitaron mi tuj sentis ke estis tre ege valora afero por mi. La kialo por komenci estis simple la muziko kiun mi tiam aŭskultis, tiu estis simpla roko kaj bluso ekz: Led Zeppelin, Fleetwood Mack, Jimi Hendrix inter multegaj aliaj...

B: *Nun mi petos de vi tre intiman respondon: Ĉu jam okazis al vi, kiel en "Bluso en Rubuj' " de Persone, serĉi vian gitaron en la fridujo?*

M: Ne, kompreneble ne! Tiu ideo neniam kaptos min.

B: *Ĉu vi pensas ke tiu ideo efektive kaptis Martin?*

M: Mi respondas kun la plej honesta seriozeco: mi ne scias!

B: *En rokmuzikaj recenzoj mi ŝatas paroli pri la influo de la muzikistoj... Oni rakontas ke vi havas tre grandan, en via privata vivo... Kion mi diru al legantinoj de Rok-Gazet' por ke ili lasu vin trankvile pretigi la kvinan kasedon de Amplifiki?*

M: Mi dirus ke ĥaosa mem-detruanta malregula vivo estas la plej bona minejo por trovi inspiron por verkoj, estu libroj, pentraĵoj aŭ muziko. Simple mi ne volas ke homoj lasu min en trankvileco...(al ŝercema demando samspeca respondo...)

B: *Kion vi nun pensas pri la hodiaŭa bildo de E-Rok-Muziko?*


M: Sendube ĝis nun la plej malfacila demando. Espereble la satiĝo de angldevena muziko kreos intereson ankaŭ por nia muzikkulturo, lasttempe estis klara novvekita emo al novaj vojoj kaj influoj en muziko, ekz. al orienta kaj araba muziko. Tio espereble malfermos eblecojn por Esperanta muzikkulturo, espereble...

B: *Kaj, post ĉiomaj ŝanĝoj tra la vivo de Amplifiki, kiun estontecon vi antaŭvidas por la grupo?*

M: Eble ĉio dependas de la reago de homoj rilate al nia lasta kasedo. Estis tre streĉige dum la lasta surbendigado kaj, se mi ne rimarkos ian positivan reagon, eble estos nia lasta kasedo. Male se ni sentos ke homoj estimas la muzikon tio montros vojon al ia estonteco, sed kiel ĝi estos, nur scias dio.

(Vidu recenzon de "Ĉu ne?" paĝo 14)





Flo: *Do, Hervé de Bikini en Tuluzo, Francio, ĉu Bikini estas io konata en la regiono?*

Hervé: En la regiono, jes, mi esperas. Almenaŭ en la regiono, jes.

Flo: *Sed ne nur en la regiono. Ĝi estas io internacia, ĝi tamen havas internacian konatecon.*

Hervé: Ni diru, ke laŭ tio ke ni estas inter la maloftaj lokoj en Francio kiuj venigas bandojn tiom intense kaj ĉefe tiom regule kaj de tiom longe, mi evidente esperas esti relative konata en specifa medio, almenaŭ en la marĝenula medio.

Flo: *Ĉu vi povos klarigi tiun medion?*

Hervé: Ĝi estas rokklubo ĉefe, roko laŭ larĝa senco de la termino, ĉar en roko mi inkluzivigas ankaŭ rege-bandojn, ankaŭ ezoteran ĵazon, kiel ankaŭ industriajn bandojn, ankaŭ... fakte, kompletan tendencaron, pli-malpli originalan, kun ĉiuj ĝiaj ekstremoj. Tio kaŭzas ke ni estas unu el la maloftaj lokoj, mi kredas, en Francio, kiuj tiom regule venigas bandojn, kaj ankaŭ bandojn kiuj foje ne estas tiom konataj. De tio, ni fariĝas loko relative konata, ĉar roko tamen estas granda familio, kaj, nu, estas loko kie oni povas foje veni.

Flo: *Kio donis al vi la ideon fondi tiajon? Estas frenezaĵo, fakte.*

Hervé: Ne, sed ne estas ellitiĝante iun matenon ke mi ekemis fari tion. Ĝi certe multe ŝuldas al la fakto ke iuepoke mankis muziko, mi parolas pri la epoko - nu, mi ja estas trideksesjara - en 74, ne troviĝis tiom da lokoj, ĉefe en Francio, kvazaŭ ne ekzistis. En 72, 73, kiam mi vere ekinteresiĝis, multe pasiiĝis pri muziko, kaj post mia restado en Anglio kie mi vidis en 75 ke ekzistas *pubs*, kluboj kie bandoj povis prezentiĝi, kie oni ne pagis enirprezon kaj povis vidi bandon. De tiam mi restis markita. Mi havis okazon fari eksperimenton en kampara kafejeto, kaj vidis ke tio estis efektive farebla, kaj de tiam iom post iom mi ne plu dubis. Kaj de kiam mi havas **Bikini**, mi trovas des pli fabelece sukcesi prezenti bandojn, afero kiun mi kredis neebla, bandojn kies muzikon ni prezentis ĉiuvespere en la klubo. Kaj vidi la personojn kies diskon oni aŭdas surscene, estas ja fabelece. Estis fabelece, nun tio tendencas rutiniĝi.

Flo: *Kiam tio ekis?*

Hervé: Kio, **Bikini**? En 83.

Flo: *Kaj kiam vi komencis organizi koncertojn?*

Hervé: Preskaŭ tuj. Mi kredas ke jam malfermiĝonte ni devis prezenti bandojn. Mi kredas ke estis antaŭ ĉio ĉi. Ĉiukaze, ni tiam ne rimarkis ke tiom necesas teĥnikaĵoj, scenaĵoj, ni kredis ke roko estas io pli spontana. Do, ĝi vere tute ne estas spontana. Nu, ĝi ja povas esti spontana, sed la homoj atendas minimumon da teĥnikaĵoj koncerne spacon, koncerne.... Por prezenti bandon, oni ne povas fari tion kie ajn, kiel ajn. Komence mi imagis ke se oni havas spacon, nur spaceton por prezenti bandojn, ĉio fariĝas ebla. Tio funckiis dum iom da tempo, ĉar vere ne estis alia loko por prezenti bandojn. Sed aktuale oni pli kaj pli postulas spacon, instalaĵojn, fakte tutan teĥnikecon pli kaj pli invadan.

Flo: *De la komenco, kiom da bandoj vi prezentis?*

Hervé: Pli ol naŭcent.

Flo: *Pli ol naŭcent. Kaj nefamajn bandojn, famajn...?*

Hervé: Bandojn kiuj estis nefamaj kaj famiĝis, bandojn kiuj devintus famiĝi sed kiuj restis en kompleta nekonateco, bandojn je kiuj mi multe kredis sed kiuj ne sukcesis teni, malaperintajn *has-been*. Nu, ĉe **Bikini** estas simple: jen ni prezentas bandojn kiuj riskas famiĝi, jen bandojn kiuj estintis famaj, jen foje ni ŝance sukcesas atingi ion kiu fakte sukcesas brili. Tio povas esti same bone referencaj bandoj, kiaj ekzemple **Rita Mitsouko**, ĉu **The Pogues**, ĉu **Les Dames**, ĉu **Bigoudis Dynamite**, aŭ tiaj kiaj **Feel Good**, ĉu... - finfine la listo trolongas - bandoj kiaj **Mano Negra**, **Les Garçons Bouchers**, la tuta aktuala tendencaro de bandoj kiuj pli-malpli sukcesas en Francio, **Noir Désir**, kio alia, **Les Négresses Vertes**, kio ankoraŭ, **Les Sherifs**, kaj mi forgesas multajn.

Flo: *Estas tamen internacia scenejo, ĉar vi prezentas ankaŭ multajn fremdajn bandojn. Ĉu vi ne povos diri al ni la naciecojn kaj la nomojn?*

Hervé: Proksimume ĉiujn de kie oni ludas rokon, krom eble de Ĉinio. Sed ke tiuj estu ĉeĥaj, jugoslaviaj, rusaj, hispanaj, italaj, nu evidente usonaj, meksikaj....

Flo: *Kio estas la nomoj de la bandoj...?*

Hervé: Nu, **Flaco Jiménez**. De Italio estis **Litfiba**. Kaj kiel nomiĝas tiu bando kiu laŭdire bonete funkcias en Hispanio... en Italio? Mi ne plu memoras la nomon. Estis **Diaframa**. Estis alia, mi ne memoras la nomon. Aliaj bandoj, krom **Litfiba**, kiuj ne transiris....

Flo: *De Sovetunio?*

Hervé: **Vabank**. Ne, estis nur **Vabank**. La eksperimento rapide avortis, ĉar ĝi interesis neniun ajn. Fari bandojn kiuj interesas neniun, jam ne penindas.

Flo: *Sed vi havis ankaŭ hispanajn bandojn.*

Hervé: De ĉie. Hispanajn, danajn, finnajn, eĉ bandojn kies nomon mi ne plu memoras. Jen la unuanura problemo. Ni faris tion ĉar ni trovis ke estas ia ekzotikeco. Aŭstralian, zairan, centrafrikan, alĝerian. Vi vidas, iom post iom mi rememoras, sed mi verŝajne forgesas eĉ pli ekzotikajn ol tiujn. Estis ĝuige, estis amuze, ni kredis ke ni ne estas la unuanuraj kiuj volas ion novan. La problemo kun ĉiuj tiuj bandoj estas ke malbonŝance ili ne plu interesas la publikon. Antaŭe, mi celas la epokon de 84, 85, kiam vi kunlaboris en tiu tuta tendenco de soifo, deziro vidi alion, kiam ni havis veran deziron ion malkovri, kiam ĝi plimalpli bone funkciis, ĉeestis ĉiam iom da homoj. Sed nun la geuloj entute ne plu scivolemas. Ne estas ĉar vi metos rusan bandon ke la homoj venos, al ili estas egale, ili prifurzas tion. Se ni venigus ĉinan bandon, estus same, neniu venus.

Flo: *Kiel vi klarigas tiun problemon?*

Hervé: Ili estas iomete supersataj. La homoj ne plu alkuregas al kio ajn, ili venas kiam ili konas kaj ŝatas ion, ja ĉefe por io kiun ili konas kaj ŝatas.

Flo: *Ĉu ne estus ĉar ili eble ne emas elspezi groŝojn por io...?*

Hervé: Ili pretas elspezi groŝojn. Kiam io koncernas ilin, ili elspezas. Se io ne koncernas ilin, ili eĉ ne pensas pri ĝi, ili eĉ ne venas. Ne estas problemo, oni venas kiam oni estas


emigita; kiam oni ne estas emigita, oni ne venas. Vi povus venigi bandon iun dimanĉon, mi ĉiam diris tion, dum dimanĉo ja estas malbenita tago por roko, ja por ĉio krom por rugbio kaj futbalo en la posttagmezo; do se vi venigas bandon dimanĉe, se la bando estas konata estos publiko, se ĝi ne estas konata ne estos publiko. Ne estas iu tago, nek iu momento, nek iu monato. Kiam la homoj emas vidi ion, ili venas. Kiam ili ne emas..., nu, ili donas pretekston, jen estis dimanĉe, jen estis lunde, jen estis antaŭ labortago, jen neĝis, jen pluvis, jen sunis. Kiam oni estas emigita, oni venas.

Flo: *Jen pika demando: ĉu vi iam prezentis bandon kiu kantas en esperanto?*

Hervé: Ne, ne. Vi antaŭlonge parolis pri tuta tendenco de **Boucherie Productions** kiu devis fari ion. Ili nenion faris. Vi parolis pri ankaŭ, kiel li nomiĝas, tiu tuluzano, **Jean-Marc Leclerc**, de la **Rozmariaj Beboj**. Mi kredas ke li estas unu el la malmultaj kiujn mi konas kiuj kantas en esperanto. Ne estas multaj.

Flo: *Estas ja aliaj, sed kiuj ne estas konataj. Ili estas konataj en la medio de EUROKKA kaj la esperantistoj. Do, ili ne prezentiĝis ĉe vi. Nu, ĉu vi povus iomete paroli pri viaj planoj?*

Hervé: Kiam mi komencis, kiam mi faris dek rokbandojn, mi feliĉis esti farinta dek, kiam mi faris cent, mi feliĉis esti farinta cent. Je kvarcent mi ne plu pensis pri tio. Baldaŭ mil, mi ne plu kalkulas ilin. Mi havas registron kie mi skribas ĉion, estas la minimumo konservi tiun memoraĵon. Foje mi trarigardas la registron, mi konstatas ke mi forgesis ke tiu aŭ alia bando estis ĉe ni, ktp. Eĉ mi ĵus vidis **Comatins** ĉe televido, ili estis ĉe ni antaŭ jaregoj. Estas bandoj pri kiuj mi miras ke ili prezentiĝis ĉe **Bikini**. Nu, kion ni intencas fari ĉe **Bikini**, estas kiel mi diris komence, kiam ni malfermiĝis ni imagis ke bando povas ludi kie ajn, kiel ajn, dek jarojn poste ni konstatas ke tio ne efektivas. Speciale ĉar mi opinias ke estas nun vera krizo en roko, laŭ tio ke la publiko estas pli kaj pli supersata, necesas fari pli kaj pli bone. Do mi opinias ke la grandaj koncertoj estas destinitaj disfrakasiĝi. Speciale je la nuna ritmo, kiam oni kantas preskaŭ nur *playback*, bendmime, aŭ kiam ne plu estas la muzikistoj kiuj ludas, sed estas maŝinoj. Do oni laciĝos de tiuj grandaj koncertoj laŭ stilo de **Dépêche Mode**, stilo de tiu anusulo **Bruel**, baldaŭ tio ne plus interesos kiun ajn. Oni konstatos ke ĉiuj tiuj varieteaĵoj, lokitaj unuaj en la *top-50*, kia **Mécano** aŭ kia **Gold**, kun cent kvindek personoj en la turneo, ktp., ke **Mécano** komplete mistrafaĉis kun tri mil personoj - estis ja delire. Nu, ankoraŭ restas la valoregoj, kia **Stones**, kia **Bruce Springsteen**, kia **Dire Straits**, kaj tiaĵoj, temas pri bandoj kiuj ankoraŭ havas talenton. Sed ĉio varietea estas destinita al la rubujo. Ni vidas ke uloj kia **Bowie** kontraŭe lasas sin prezentiĝi en malgrandaj salonoj, kaj ni vidas ke **REM** postulas malgrandajn salonojn. Kaj ni vidas ke multaj personoj, famegaj muzikistoj, kiel ni apenaŭ povas imagi, kaj eble temas pri la antaŭuloj de nova koncertstilo, personoj kiuj volos ludi en homecaj ejoj, ejoj kie la publiko povos senti sin kun la muzikistoj, povos unuavice diskuti kun ili, ne devos senti sin konsiderata kiel nure monfonto, ne simple pagi kaj esti parkumita, en aĉaj kondiĉoj kaj kun gardistoj ĉie kiuj forigos vin se vi apenaŭ levos fingron - ĉio tio malaperos, mi estas persvadita. Kaj eĉ bandoj prestiĝaj, profesiegaj, dinamikaj, kaj kiuj alfluigas publikon, kaj kiuj ne faras tiajn koncertegojn, estas la unuaj kiuj provas renovigi tion, ili ne plu eltenas tiaĵojn.



Do ĉio tio por diri al vi ke mi ne pretendas ke mi sukcesos fari idealaĵon, sed provos fari el **Bikini** koncertejon pri kiu mi revas de tempego, t.e. etan salonon de homecaj kondiĉoj, kun inter sescent kaj mil personoj kiam ĝi estos plenŝtopita, mi preskaŭ sukcesas tion aktuale....

Flo: *En la naĝbaseno...?*

Hervé: Jen. Do, ke la homoj, almenaŭ kvarcent aŭ kvincent, aŭ eble sescent, povu vidi la muzikistojn laŭ vera grandeco. Kaj kontraŭe ke kantisto povu se li volas iomete kuri sur la scenejo, ke kiam li emos salti li povu salti, ke se li havos verajn scenefektojn, li povu esprimi sin totale, ke estu iom da lumefektoj, ĉio tio. Kaj, bone, mi laboras por realigi ilon perfektan por mi, por realigi mian pasion, por realigi miajn komercajn pretendojn, mi ne kaŝu tion, ke ni povu fine fari rokon laŭ bonaj kondiĉoj, laŭ homecaj kondiĉoj. Jen. Kaj mi certas ke ek de tio ni sukceos havi pli kaj pli interesajn bandojn, bandojn kies ĉeeston en malgranda salono mi tute ne esperis, mi pensas pri uloj kia **Iggy Pop**, kia **Bowie**, kia **Lou Reed**, kaj mi forgesas aliajn, mi certas ke post nelonge ili postulos prezentiĝi en malgrandaj salonoj. Kaj kiam mi diras malgranda salono, mi ne celas tiajn kien oni alvenas kiel en teatrojn aŭ en kulturdomojn, sed mi celas ejojn, mi ne diros templojn, sed ejojn kie oni vere ŝatas rokon, kie oni faras rokon. Ne kie ajn.

Flo: *Do Bikini ne estos mito, ĝi estos ejo certa?*

Hervé: Ni ne dubas. Mi kredas ke jes. Malgraŭ progresoj, mi ankoraŭ ne atingis mian celon. Mi emas ĉiam fari pli, fari pli bone, havi muzikistojn plikonatajn, pli lertajn. Mi emas havi verajn muzikistojn, verajn bandojn. Ĉar, sciu, inter la naŭcent bandoj mi vidis multajn fekulojn, multajn ulojn kiuj fieraĉis, multajn kiuj taksis sin la reenkarniĝo de **Rolling Stones**, mi vidis multajn aferojn. Kontraŭe mi vidis multajn bonajn bandojn kiuj ne fieraĉis. Finfine ja estis iom da ĉio. Do, post ĉio ĉi, por atingi nian celon, la estonto de **Bikini** estas havi veran scenejon, ja homecan scenejon. Ĝi ne estos cent kvadratmetrojn granda, nek kvar kilometrojn alta, nek por teni dudek tunojn da instalaĵoj, ne. Ĝi estos homeca scenejo kie oni povos fari bonajn aferojn.

Flo: *Kaj certe kiel eble plej internacie?*

Hervé: Jes. Ĉiukaze, oni prifurzas nun Usonon, Japanion, kaj ĉion tion. La ununura gravaĵo estas: se vi havas talenton, vi ludu, esprimu vin. La gravaĵo estas talento, ne plu lando. Estas scii ion fari, havi ion por diri, esprimi sin. Kiu ajn via nacieco, estas povi doni tion kion vi havas interesan por doni, jen. Si vi nulas, ne penindas, ĉu vi estas ĉeĥo, libanano, arabo, ĉu vi estas eskimo aŭ alio: se vi estas bona, vi estas bona; se vi ne estas bona, ne penindas fari turneon, ni prifurzas tion. Tio jam okazis ĉe ni. Ni prezentis rusan bandon, ili ne restis longe. Ni pensis ke tiu rusa bando estus devinta «akrigi» sian gitaron antaŭ ol ekturnei. Mi prenas tion nur kiel ekzemplon. Nuntempe korespondas al nenio nur diri ke ili estas rusoj. Eĉ ne plu penindas diri la naciecon de bando nun. Se ili havas ion interesan por diri kaj fari, ili faru ĝin, kaj jen ĉio.

Flo: *Roko ne plu havas landlimojn, kaj do fariĝas universala...?*

Hervé: Jen, absolute. Ĝi estas vere sen landlimoj. Evidente ke ĝenerale tio tendencas veni de Anglio aŭ de Usono.... Sed tio komencis veni ankaŭ de aliaj landoj, notinde de Francio.

Flo: *Kaj ĉivespere estas Dazibao?*

Hervé: Jes, vi vidos.

- Tradukis kaj pretigis RoKo

dazibao

Flo: *Dazibao, kion tio signifas? Estas homoj, muzikistoj? Kion vi do povos prezenti? Almenaŭ la tri uloj kiuj estas ĉi tie?*

Jean: Mi estas **Jean**, kaj mi estas basisto de la grupo **Dazibao**.

Lucas: **Lucas**, gitaristo.

Ĵamil: **Ĵamil**, kantisto. La forestantoj estas **Paul**, drumisto, kaj **Thierry**, gitaristo kaj klavaristo.

Flo: *Dazibao, de kiam?*

Ĵamil: Jam de tempego.

Flo: *Mi celas daton.*

Jean: Fine de 82 ni komencis, kun proksimume la sama formo. Kaj de tiam ni havis periodojn bonajn kaj malbonajn, periodojn dum kiuj ni multe laboris kaj periodojn dum kiuj ni malpli multe laboris. Nun ni eniras periodon de multa laboro.

Flo: *Kiu estas plejaĝa en la bando?*

Jean: Nu, ni fondis la bandon kvarope. Fakte, kvinope: estis unu, Maurice, kiu ludis mezepokajn instrumentojn, kaj fakte tio ne kongruis kun li laŭ teĥniko, ĉar ni ludis tre forte kaj li ne povis per siaj instrumentoj. Nu, estis Ĵamil kiel kantisto, estis Pierre ĉe sinteziloj kiu ne plu estas kun ni, do estis Paul kaj mi, Paul ĉe drumoj kaj mi ĉe baso. Do, ni vere komencis kvarope, sed tuj Jean-Luc alvenis. Kaj do ni troviĝis kvinope. Kaj antaŭ du jaroj kaj duono, Pierre foriris. Oni daŭris unu jaron sen li, kvarope, kun baso, gitaro, drumoj, kantisto. Kaj tiam Thierry aliĝis al ni.

Flo: *Ĉu vi povos doni mallongan historion de viaj faraĵoj. Mi supozas ke vi faris multajn koncertojn, sed vi faris ankaŭ diskojn. Kiu el vi povos paroli pri tio?*

Ĵamil: Ni faris nombron da diskoj, laŭ nia tiama stilo. Ni faris diskon ses monatojn post nia fondiĝo. Vi povas imagi kia ĝi estis. Ĝi eldoniĝis en 83. Poste ni faris alian diskon titolitan *Dakin*, eĉ pli malbonan ol la antaŭa. Poste ni faris grandan disketon titolitan *Sahd*, poste diskegon *Les Musiques de la honte*, diskon *Allah el watan el melik*, alian diskegon titolitan *Amok*, kaj albumon ĵus aperintan titolitan *Shems*, «la Suno». Kaj dekojn da kompilaĵoj en kiuj ni ludis: kompilaĵojn de kasedoj kaj diskoj. Do, kiam temas pri diskaro, ni estas sufiĉe solidaj.



Flo: *Kaj kiam temas pri koncertoj, mi supozas ke vi estas veteranoj. Kiom da koncertoj vi jam faris? Ĉu vi povas ankoraŭ kalkuli ilin?*

Jean: Kiam oni atingas kvindekon, oni diras «'stas bone». Post kvindek, oni ne plu kalkulas. Jam de longe ni faris kvindek koncertojn. Endas diri ke komence ni ne estis tre lertaj sursceneje. Ni lernis malrapide, estis malfacile. Ni lernis farante. Antaŭ ol **Dazibao** kelkaj el ni ne jam estis en bando, estis la unua bando. Sed tio ne estas tiom kriterio. Ni estas malnova grupo....

Lucas: **Matura** grupo....

Jean: Sed ni ne havas nefleksеblan sistemon, kiel havas nemalmultaj grupoj dekjaraĝaj.

Ĵamil: Ĉiukaze ni penas konservi nian tutan freŝecon, tiusence ke ni taksas ke endas atenti, kiam oni ŝatas ion, por ne troigi, por ne naŭziĝi. Ekzemple, drogoj... ne, mi ŝercas. Tion ni faris kun la muziko: ni scipovis ĉesi ĝustatempe por ripozi, ni scipovis ne fari tro da koncertoj por konservi iun energion sursceneje kaj emon refari koncertojn.

Flo: *Ĉu vi povas nun priskribi vian muzikon? Necesus povi klarigi tion al la geuloj kiuj legos nian foliaĉon.*

Ĵamil: La respondo tre simplas: ni ne **klarigas** nian muzikon, ni **faras** nian muzikon. Ni ne povas provi ankaŭ klarigi ĝin. Mi ne scipovas klarigi nian muzikon.

Jean: Simplas: ne estas nia tasko priskribi nian muzikon, ni faras ĝin. Do estas **via** tasko priskribi ĝin, vi estas redaktisto.

[Ridoj.]

Flo: *Estas malfacila tasko, ja. Sed vi sentas ĝin pli, ĉar ĝi eliras vin.*

Jean: Ĉu oni povas analizi ĝin? Kio estas la intereso por ni analizi ĝin? Ĉu vi komprenas?

Flo: *Jes. Sed kion ĝi donas al vi? Ĝi ja donas ion al vi?*

Jean: El pure muzika vidpunkto. Ni ne faras tion pro iu koncepto, tio ne koncernas nin. Finfine, kion vi diros al la legantoj estas kion ĝi donas al **vi**. Ĉu bone? Kion ĝi donas al ni estas tre persona. Jen. Ĝi estas io kiu ekzemple ebligas al ni vivi....

Ĵamil: Ne finance....

Lucas: Emocie.... *[Ridoj]* Animnutraĵo.

Jean: Kaj jen. Ni havas tion unuflanke, kaj aliflanke estas la publiko kaj kaj ĝia elvokateco, ĉio kion ĝi sentas. Kaj tion ja **vi** povas diri, sed **ni** ne vere povas.

Flo: *Estas tamen io tre originala viaflanke, tio ke la grupo, almenaŭ la kantisto, kantas arabe. Kial vi faris tiun elekton, ĉar ja temas pri iom malfacila elekto, ĉu ne?*

Ĵamil: Ĝia originaleco estas ke ĝi havas nenian gravecon. Ĝuste ni ne volis fokusi sur la kantadon: ni ne volis fari kantadon, ni volis fari la muzikon kiun ni decidis fari. Ekzemple tiun ĉi albumon, kvazaŭ tute en araba. Ni volis montri ke ni kapablas fari muzikajn pecojn kiuj transdonas sentojn sen apogiĝi sur tekstoj en franca lingvo kiujn la homoj povas kompreni. Do, ni forigas jugon por plifortigi nian muzikon. Nun, konsiderante tion kion ni faris en tiu ĉi albumo, kiu estas muziko kiu pasigas la emociojn kiujn ni volis pasigi, nun ni povos fari pecojn en la franca.

Flo: *Sed ĉu vi jam faris pecojn en la franca aŭ en aliaj lingvoj?*

Ĵamil: Jes, estas tamen unu en tiu ĉi albumo en la franca. Ni ne volas forgesigi ke ni tamen estas franca bando. Kiel kantisto kaj persone mi ŝatas la francan lingvon. Mi grandiĝis en la franca, mi nutriĝis per la franca, mi legas france, mi legas nur france, kaj ĝi estas lingvo kiun mi ŝatas paroli. Mi kredas ke samas por miaj amikoj: ili ŝatas paroli tiun lingvon, ili ŝatas aŭdi ĝin, ili ŝatas uzi ĝin, kaj ili scipovas uzi ĝin. Estas amuze, ĉar mi nun laŭdas la francan en esperantista magazino, mi trovas tion grandioza. *[Ridoj]*

Flo: *Ne gravas. Ni tute ne estas kontraŭ la franca. Nek kontraŭ kiu ajn alia lingvo.*

Ĵamil: Mi jam tre bone komprenis. La ideo de esperanto estas ideo kiu interesis min. Samtiel ke ekzemple mi parolas la anglan. Estas plezuro paroli angle kun homoj kun kiuj mi ne povas paroli alian lingvon. Mi neniam legas libron angle ĉar mi timas ne kapti la nuancojn. Kaj fakte mi rimarkis hodiaŭ mem, pripensante sola en la kamiono, ke tio estas eraro, ĉar mi lasis aliajn fari tiun laboron, kaj oni ne povas ĉiam fidi ilin. Ja estis eraro.

Por reveni al la araba, fakte estas originale, kaj se ni kantas nur arabe, tio lasas al la homoj nur la muzikon. Ankaŭ la muziko de la voĉo, ĉar la homoj ŝatas voĉojn. Se ne, ne ekzistus tiom malmultaj nure instrumentaj bandoj.

Flo: *Krom por la homoj kiuj komprenas la araban, krom se vi kantas fuŝan araban, kiel multaj bandoj kantas fuŝan anglan. Mi ne povas taksi, mi tute ne konas la araban...*

Ĵamil: Ne, ne, efektive estas bona, kaj araboj povas kompreni la tekstojn. Sed tio tute ne gravas, ĉar tio kion ni volas fari estas pasigi sentojn pere de la muziko, de la voĉo, pere de la gitaro, pere de la drumoj...

Flo: *Nu bone, vi volas pasigi sentojn, sed la tekstoj devas havi iun mesaĝon. Kio estas la funda mesaĝo de la tekstoj?*

Ĵamil: Ĝenerale, temas pri amkantoj. Inkluzive de la politikaj, aŭ pli bone dirite, engaĝitaj, kiuj pritraktas gravajn temojn kia **Intifada**, kia fanatismo, kiuj estas homaj mistrajtoj. La tekstoj provas enkadrigi tiujn problemojn. Ni povas nur malfacile prijuĝi, ni povas nur iomete analizi, vidi kio reale okazas, foje simple vidi ĝian foje ridindan flankon, kaj remeti ĝin je ĝia ĝusta nivelo, kie ne restas tre multe krom la homrilatoj simplaj kaj belaj aŭ efikaj. Uzante tiucele diversajn rimedojn kiajn ironio, humuro, aŭ... kolero, kaj tiaĵoj.



Dazibao Foto Marc DUBOIS HODGKINSON

Flo: *Finfine estas tre roka.*

Ĵamil: Verŝajne jes. Laŭ malnova senco de la vorto: ribela.

Flo: *Ĉu vi havas malfacilaĵojn pro la fakto ke vi estas bando kiu faras muzikon kun arablingvaj tekstoj?*

Ĵamil: Jes. Sed fakte ni mem retenas nin de facilaĵoj koncerne la lingvon, sed samtempe ni laboras sur la fundo. Unuavice, estas pli facile por aŭskultanto alkroĉiĝi unue al la vortoj, due al la melodio, poste al la muziko, kaj fine al la fundo de la muziko. Por ni tio ne gravas, ĉar ni havas tempon por antaŭenigi nian muzikon. Tio povas unue forigi de ni tiujn kiuj estas allogataj de nia muziko sed iom forpuŝataj de la araba flanko. Tio fakte neniom gravas.

Jean: Aliflanke estas multaj kiuj kantas en la franca kaj utiligas la tekstojn kiel lambastonon. Kaj kiam ili kantas angle, estas ĉefe kamuflaĵo. Mi celas francajn bandojn kiuj kantas angle. En nia kazo, Ĵamil parolas egalbone france ol arabe, kaj la araba finfine plitaŭgas por tio kion ni faras, por sufiĉe multaj pecoj. Jen nia celo. Se tio blokas nin komerce, estas problemo, sed nur relative. Kio gravas al ni estas fari muzikon kiu plaĉas al ni, punkto-fino. Poste, ni provas vendi ĝin. Jen nia metodo. Sed ni ne kantos france **por** vendi. Se ni kantas france, estas ĉar tio taŭgas por nia muziko. Ĉar ni emas tion fari, punkto-fino.

Lucas: Ke ni kantas arabe, tio ja kaŭzas komercajn problemojn, kaj tio lasas monon por la aliaj bandoj. Ni ne volas esti malafablaj al la aliaj bandoj. Estas komence malavantaĝe por ni, sed tiel la aliaj bandoj povas elturniĝi. *[Ridoj]* Kaj ni forgesis diri ke la araba estas bela lingvo, ĝi havas esprimivajn sonojn, kaj tio estas parto de la muziko de **Dazibao** aktuale. Eble ni poste faros alie, sed momente mi preferas tion, mi preferas la sonon de tiu lingvo kaj tion kion ĝi alportas al nia muziko.

Flo: *Ĉu vi parolas ĝin?*

Lucas: Ne.

Flo: *Kiom da personoj en la bando parolas ĝin?*

Ĵamil: Mi.

Flo: *Do, la kantisto. Ĉu vi parolas la araban kiun vi lernis de la gepatroj? Vi diris ke vi kantas la araban por esprimi sentojn, tio estas pli-malpli integra parto de la muziko. Kaj vi diris ke esperanto interesas vin: ĉu vi pensas ke vi iam kantos en tiu lingvo?*

Ĵamil: Ne, absolute ne. Ĉar mi bezonas aliajn lingvojn por komuniki. Kiam mi estis infano, mi konis homojn kiujn mi ŝatis kiuj parolis esperanton. Ili havis tute misteran flankon, ili vivis en okcitana vilaĝo proksime al Tuluzo, kaj en tiu vilaĝo ili estis la du nuraj kiuj parolis esperanton. Kaj mi ne sukcesis kompreni kial oni parolas esperanton: mi trovis tion grandioza. Mia patrino provis klarigi al mi pri esperanto, kaj ankaŭ tiuj homoj klarigis al mi: sed mi ne komprenis la intereson. Mi trovis tion ekstraordinara, mistera. Estis bele peni por lerni lingvon kiun ĉiuj homoj parolos. Sed ĉar ne ĉiuj penemas por tion fari, mi trovis ĝin ankaŭ ridinda. Kaj estis bele tiel.

Flo: *Ĉu iu el vi havas alian respondon al tio?*

Jean: Atentu: ekzistas universala lingvo hodiaŭ, la angla.

Lucas: Ne tiom...

Jean: Tamen. Ĝi estas la dua plej parolata lingvo en la mondo post la ĉina.

Lucas: Ŝajnas ke estas nuntempe la hispana.

Jean: Eble. Tamen, kiam vi iras kien ajn, vi ĉiam trovas iun kiu parolas angle, kiu fuŝparolas kelkajn vortojn. Tio sufiĉas por komuniki. Estas tio universala lingvo. Do, Ĵamil foje kantis kelkajn pecojn angle, en la epoko kiam ni faris proksimume po trionon en araba, franca, kaj angla. Kaj li ĉesis kanti angle, ĉar ĝi ne estis lia gepatra lingvo, kaj ne tiel povis esprimi fortajn sentojn.

Ĵamil: Mi kredas ke hodiaŭ ekzistas vektoro de sentoj kaj emocioj, de esprimado kaj komunikado, kiu estas la plej potenca tra la tuta mondo por paroli inter homoj - kaj estas tio kion ni faras - estas muziko. Punkto-fino. Kaj tiam mi diris ke la araba ne gravas, kaj tial mi ne sentas bezonon lerni esperanton aktuale, ĉar mi havas neniun kun kiu paroli esperante. Kaj eble iam mi parolos esperanton, sed hodiaŭ ne gravas ĉu mi parolas ĝin aŭ ne. Kontraŭe, foje mi bedaŭras ke pli da homoj ne parolas la anglan, ĉar videble ĝi fariĝas la lingvo kiun ni uzos por komuniki. Ekzemple kiam ni vojaĝas. Ĉar ni vojaĝas.

- tradukis kaj pretigis RoKo

Diskaro

Shems
(diskego, k-disko, kasedo) Mar. 91
Zelig. Distr: Danceteria.

Amok
(k-disko, kasedo, diskego, 7 titoloj + 2 bonusaj) Dec. 90
Zelig. Distr: Danceteria.

Boléro
(k-diska kompilaĵo, 1 titolo.)
Out of Nowhere, ref. OON CD001. Distr: New Rose.

Amok
(diskego, 7 titoloj) Nov. 88
VISA - Ultima Flux, ref. UF 007. Distr: New Rose.

Y a-t-il un pilote dans lemming?
(k-diska surscena kompilaĵo, 2 titoloj) Aŭg. 88
Bondage Records, ref. BR 023. Distr: New Rose.

Rome / Berlin / Genève
(60-min. surscena kasedo) Jun. 88
New Wave Records, ref. NW 026. Distr: GMG.



Rainmakers
(partigita disketo) Jun. 88
Out of Nowhere, ref. OON 001. Distr: New Rose.

Les musiques de la honte
(diskego, 10 titoloj) Nov. 87
VISA - Ultima Flux, ref. UF 003. Distr: New Rose.

Allah el watan el melik / Waltz
(disketo) Jun 87
VISA - Ultima Flux, ref. UF 002. Distr: New Rose.

Sahd
(granda disketo) Apr. 86
New Wave Records, ref. NW 017.

Le cimitière des passions
(diskega kompilaĵo, 2 titoloj) Mar. 85
New Wave Records.

Dah kin
(disketo) Apr. 84
Shame Records.

Les tambours lointains
(disketo) Dec. 83
M. Vynil Records.


Manaĝer-kontakto

Philippe Saintlos
38, rue Boyer
F 75020 PARIS



Pri la koncerto de DAZIBAO

Sintezil- kaj gitarnotoj ĉirkaŭiras antaŭ abruptaj drumfrapoj, kaj tuj alvenas basan voĉon de giganta kantisto. Jen komenco de la koncerto per tiuj ŝvebantaj notoj de **Dazibao**.



Thierry

Ekde la komenco, **Dazibao** ekkaptas la publikon per sia muziko ekstrema, muziko kiu tuj enirigas vin per vigla potenco de pezaj kaj ekzotikaj ritmoj. En ili ni sentas amason da influoj. Sed **Dazibao** sukcesis krei sian propran. En tiu ĉi koncerto **Dazibao** naskis etoson kiu ĵetis la publikon en profunde frenezan malhelan staton. Muziko kaj voĉo ŝiris nian ventron kaj prenis niajn tripojn ĝis doni emon plori. **Dazibao** sentigis al ni angoron, amon, malamegon, ribelon, furiozecon kaj pasiegon. La araba kantado bonege agordiĝis al tiu muziko kiu perfortigis kaj turmentis niajn sentojn. La tekstoj de la kantoj temis pri amo, malamo, kontraŭ religio, kontraŭ milito, kontraŭ ŝtatpotenco, kontraŭ pasiveco, ribelego, ktp. Muziko kaj voĉo fariĝis tuto kiu komprenigis al ni la gravecon de tiuj veroj. Publiko kaj **Dazibao** fariĝis tuto en profunda interkompreniĝo. Mi ne povas aliel priskribi tiun muzikon, mi nur povas diri ke ĝi tre viglas, ne pro la ritmoj, sed pro la sentoj kaj interna potenco.

Ni sentas influojn de **Joy Division** aŭ **Echo and the Bunnymen**. Tiu muziko ne metas vin en komforton, sed male en trudadon, konfuziĝon, kaj ĝenon. Tuj oni reagas ĉar ĝi tiklas niajn plej profundajn kaj intimajn sentojn. **Dazibao** situas en tiu generacio de novaj grupoj kiel **Noir Désir** el Bordozo kaj **The Young Gods** el Svisio. Sed **Dazibao** havas iom pli, iom da araba ekzotismo nuancas kaj heligas obskurecon.

Do, mi volas ankaŭ aldoni al tio ke tiu muziko ne nur viglas, sed ĝi havas etoson kiu transportas vin ĝis tie kien volas la grupo. Mi pensas ke ili estas tre bonaj aktoroj, ĉar sur scenejo oni sentas kion ili kantas nur pro la ĉeesto de la grupo. Oni ne komprenas la tekstojn de la grupo ĉar la kantisto kantas arabe. Sed tio ne gravas. La muziko sentigas al ni kion ili volas. Kaj eĉ se la tekstojn oni ne komprenas, oni sentas ĝin. Ekzemple kiam temas pri milito, oni sentas ke estas milito en la muziko, kiam temas pri amo, oni sentas ankaŭ tiun amon en la muziko kaj en la nuancoj de la kanto.

Mi pensas ke estas bonega grupo kiu sukcesos ion pli gravan. Espereble ke ili alvenos ĝis iom pli da konateco. Mi konfesas ke mi tre ŝatis tiun koncerton, kaj ankaŭ la publiko kiu estis tie tre ŝatis. Do mi povas uzi la vorton «amis»: ni amis tiun koncerton kaj la grupon.

Surscene **Dazibao** estas kvar homoj. **Thierry** la gitaristo, havas tre ŝvebantan, iom ekzotikan ludadon, tre tiklan, tre klaran, tre puran. Sed kiam li volas, havas ankaŭ tre pezan sonon kiel ekzemple larsen-bruon. Tiu gitaristo estas tre ĉarma kaj havas tre belan vizaĝon, kun vosteto ĉe la haroj. Poste venas la drumisto, **Paul Dufayet**, kiun oni nomas **De La Tour**. Li estas tre longhara kaj havas ege da energio. Li frapas la drumojn tre forte kaj vigle, samtempe tre precize, tiel donante tre abruptan sonon, kiu laŭ mi donas grandan efikecon en la koncerto kaj en la muziko. **Ĵamil Saiahr** estas la kantisto. Pro sia grandeco (li estas preskaŭ du metrojn alta), sia forta personeco, kaj sia kantmaniero, li havas grandan staturon. Li donas sin mem al la publiko, kaj la kanto fariĝas tre forta, ankaŭ tre senta. Li tre gestas dum kantado, kaj akcentas la kantojn ekzemple saltante aŭ falante sur la genuoj. Li tiel havas tre efikajn rimedojn. **Jean Zundel** estas la basisto. Li estas statika sed sufiĉe impona, ne pro la staturo, ĉar li estas iom maldika, sed pro lia ludo, kiu estas tre preciza kaj perfekte akordiĝas kun la drumoj. Kaj samtempe kiel la gitaristo, li tre klare ludas, kaj sukcesas havi bonegajn turnantajn sonojn, ankaŭ kun larsenaĵo. Tio fariĝas peza muziko, sed donas etoson. Laŭ mi, la baso kaj drumo estas tre ritmemaj instrumentoj en la kadro de tiu ĉi grupo. **Lucas Zabojnik**, gitaristo kaj sintezilisto, ludas kaj programas la klavarojn. Tio ĉi estas grava, ĉar la pezaj kaj eĉ malpezaj, ekzotikaj ritmoj venas de li. Li gitaras pli akre ol



Ĵamil

Thierry, ĉar tiu estas la solisto, dum Lucas ludas ritmon. Li havas la malpuran sonon de tre saturita gitaro, kiu donas parton de tiu etoso en kiu la muziko eniras vin kaj prenas viajn tripojn.

Flo!

kritikloj





Tutmonda Muziko

Freŝa blovo el Germanio

Mi surpriziĝis ricevinte ĉe la redakcio demo-kasedon de tiu **Tutmonda Muziko**. Vidanta tian nomon, mi pensis: jen novaj ŝercmuzik-frenezuloj folkloraj.

Sen konvinko mi ŝaltis la kasedilon kaj tuj miaj haroj grimpis supren je la unuaj notoj. Ho diable, kia sono...!

Jes, io nova kaj frapa por Esperanto.

Mi estis malkovrinta la unuan E-ŝlagro-popmuzikon.

Malantaŭ tiu nomo mi ne povis imagi ke sin kaŝas tia muziko. Miraĵo...!

Atentege mi malkovris pecon post peco. Furoraĵo, tiu ina voĉo... ĝi faligos pli ol unu! Tremoj....

Muziko balanciĝas laŭ ŝlagraj ritmoj popaj kaj kelkfoje roketaj. Ho, jes! Tiu pura sono - klarega studiosono. Klavara novonda stilo elfluas inter gitarnotoj ĉu **Police**-aj, ĉu **Sting**-aj, kelkfoje **Santana**-aj. En kelkaj pecoj kvazaŭ diskoa muziko movemigas la korpon laŭ la kadenco. Kia novaĵo...!

Tuj post unua aŭskultado mi volis scii pli, ho jes, jen paperoj en la koverto. Ho... fek...! En la germana...!

Telefono...! Kiu scipovas germane...? Alvokoj al la E-kunlaborantoj en Tuluzo.... Finfine, jen tradukisto: Jak Kobel, kaj prezentiĝo de **Tutmonda Muziko**.

Gazetkomunikaĵo

«Malgranda paŝo por muzikhistorio, sed grava por la homaro.»

Tutmonda Muziko volas kontribui al faligo de la lingvobariloj samtempe kiel al la forigo de la landlimoj inter eŭropaj landoj.

Tutmonda Muziko celas partopreni en la Eŭropa Ŝlagrofestivalo, anoncante ke ankaŭ Esperanto estas eŭropa lingvo.

Respondecas pri la ĝenerala arta konceptado Rainer Konrad, kiu verkis muzike kaj tekste la dek du titolojn de la kasedo kaj k-disko. Li jam famiĝis en Germanio pro unua albumo, *Troja Projekt'*.

La ina supervoĉo, nova stelo, venas de Karin Rossov.

La sonteĥnikisto Bernd Hasebrink de la fama studio **New Line** en Stuttgart (Gemanio) surbendigis kaj miksis sukcese.

Gunter Koch instigis, organizis, kaj produktis la projekton.

Esperanto estas la titolo de tiu ĉi albumo.

Post unua aŭskultado mi povas diri ke tiu ĉi muziko sonas moderna kaj aktuala, sed mi reaŭskultu pli funde kaj detale.

«Kiam ni», unua titolo de la kasedo/k-disko, komenciĝas per sintezila orgenfono akompanata de akustika gitaro kiu hispankolorigas la pecon. Kaj *«la mondo eterne diurnas...»* per la ĉarma enkonduka voĉo de Karin, *«sed mankas respondo pri sort'»*. *«Vi, kiam ni amos vin...»* respondas du viraj voĉoj en la rekantaĵo kiu puŝas vin kunkanti. Daŭre tiu akustikgitaro akompanas la pecon miksita de drumo, sintezilo, kaj baso.

Dua kanto alvenas: sintezila popritmo sufiĉe mola lante balancigas kaj muzikas vin. Jen «Mia muziko».

Trian pecon pli rokan, ni diru pli novondan reliefigas Karin: «Ne forpaŝu». Ĉu finfine Esperantio trovis sian **Madonna**-n aŭ **Alla Pugaĉeva**-n!? Ĝi estas unu el la plej bonaj pecoj de la albumo laŭ mia gusto, en kiu muziko kaj kanto bonege akordiĝas.

«Esperanto» alvenas kiel himno: tiu ŝlagra peco titoligas la albumon. Mi povas facile imagi ke dum UK ĉiuj partoprenantoj ekstaros kaj kunkantos tiun novan himnon pli aktualan ol «La espero». (Ni ne blasfemu...!)

«Gitarano», la instrumenta parto de la albumo, sentigas al ni influon de **Carlos Santana** kiun tre certe Rainer Konrad ŝategas pro lia gitarludo.

En «Via nokto» kaptas nin, denove, la profunda kaj varma voĉo de Karin, responde al vira voĉo. Gitarkoruso tre melodie respondas al klavara.

Flankon B de la kasedo, aŭ la 7an pecon de la k-disko enkondukas «Tragedio»: *«Hu, hu, tragedi', tamen ĝi aspektas kiel komedi'...»* anoncas la rekantaĵo kiun oni ne povas aŭskulti sen kanti.



de maldekstre, Gunter KOCH, Rainer CONRAD, Bernd HASEBRINK

«Ne, ne plu»: *«Finon al milto. Ĉu vi ne aŭdas la ploregon de la homoj en la mond'? Kontraŭ milito, ne, ne plu.... Armeo servas al milito, neniam al la pac'. Ne, ne plu. Finon al milito, ne, ne plu. Aŭskultu...!»* Jen mia plej ŝatata titolo. Ĝi roketas, vivas, kaj sentoplenas. La orkestrado kaj teksto hardiĝis por fari tuton frapan; mankas iom da akreco en la gitarsolo kiu tie restas iom tro pura, tamen la rezulto estas sufiĉe signifa. La voĉtono de Karin atingas la grandecon de la ideo de tiu ĉi peco.

«Ŝi klasikas, mi rokemas»: amkanto. En diskoteko, verŝajne dum kongresoj, nokte, tiu ĉi titolo havos sukceson.

«La rakonto de la amo»: jen alia kanto pri amo kiu ĉirkaŭbrakigos kaj ekparigos gejunulojn en IJK kaj IS.

«Ho soleco»: malfeliĉulo kiun ino forlasis. Ĉu ŝi revenos?

«Mia ĝuo»: lasta kaj denove en diskoteko kie oni povas danci laŭ preskaŭ diskoa ritmo.

En tiuj kvar lastaj muzikpecoj Karin malaperas de la ĉefkantado, anstataŭas vira voĉo relative agrabla. Tamen mi preferas tiun de Karin, korinklino devigas....

Por konkludi, mi pensas ke la rezulto estas tute profesia kaj ege altkvalita. Mi povas imagi la sukceson de tiu danca kaj ŝlagra E-popmuziko en Esperanto-aranĝoj, sed ne nur tie....

Nun restas al ni la espero vidi tiun freŝan popgrupon sursceneje.

- Flo!

Tipitapitipite Pitipitapitipite, Ŭah, Ŭah! Ĉu ne?

Esperanto ne konas landlimojn, Muziko ankaŭ ne! Kaj E-Rok-Muziko ankaŭ ne konas limojn...Kiam gitaroj sonas roke kaj korusas vigle, kiam kanto sonas Esperante, tiam ludas Mikke! Kiam akordoj ritmas efike, kiam piano trilas glite kaj ĥoroj ĝuigas plenefike, tiam rokmuzikas **Amplifiki**... Ĉu ne? Kiu kontraŭdiras, en la fundo? Ah! estas vi Georgo! Ne mirigas nin, vi ĉiam prifajfis muzikon, nur interesas vin retoriko! Sed Rokmuziko prifajfas retorikon, kaj se mi fajfas estas akompanante ĝin.

Kiu ankoraŭ ne havas "**Ĉu ne?**", la lastan kasedon de **Amplifiki**? Do rapide ĝin mendu, ĝi jam mankas al viaj oreloj, al via kolekto, al via Esperantoteko! Kaj ĝia prezo jam tro pezas en via monujo!

Kvankam V.Soroka ne partoprenis la realigon de tiu albumo, oni nete sentas ian subkonscian influon de lia albumo "Destin'", ie kaj alie tra la pecoj, eĉ se estus nur pro la gasta partopreno de Ĵomart kaj Nataŝa! Fakte, gaste ankaŭ aperas Pigo, korusante kun Mikke, Martin kaj Oksana... tio nur por la lasta versio de "Mi volas ŝin", kiu malsamas la unuan, tiu de la disketo de VinilKosmo, sed ambaŭ havendas kaj aŭskultendas... kion ajn pensu Mikke!


Sed oni ankaŭ sentas la influon de **Persone**: efektive la albumo entenas... 62 minutojn... kaj 20 sekundojn da bonega muziko! Bedaŭrinde ankoraŭ ne sufiĉe da rapidritma rokmuziko... sed tamen plena kaldrono da fajrantaj gitaroj! Kaj nuboj da voĉoj: Mikke, Juhani, Ĵomart, Nataŝa, Ann, Oksana, Vladimir, Aleksandra kaj ... Martin. Ĉu ankaŭ pro li iomas alimaniere Persona influo?

Kion diri pli pri tiu rava albumo kiu finmalfermas novan eraon de la E-Rok-Muziko? Ke ĝi estas pruvo ke eblas fari tian muzikon sen paroloj? Ke la gitaro de Mikke, pli ol ĉiam, fiere sonas? Ke lia voĉo maturiĝis kaj ĝuas ŝvelmolajn aŭ ritmajn akompanojn de gastaj ĥoroj? Ke temoj kaj stiloj diversas por fuĝigi enuon, samkiel la multnombraj ĉefvoĉoj, ĉu gastaj, ĉu de **Amplifiki**?

Mi havas nur unu bedaŭron: la teksto-libreto eldonita de **Edistudio** estis tro haste presita, kaj sekve mankas korektado... kaj strofoj en iuj kantoj! Sed tio ne vere ĝenas: la kantoj estas klare kompreneblaj, korekte interpretitaj kaj perfekte surbendigitaj en la jam fama **Pigstudio**... Same kiel la tuta albumo cetere, kaj krome tre taŭge miksita! Profesia laboro!

Mi tamen ankoraŭ plendos pri plia afereto: mi jam senpacience atendas la kvinan kasedon de **Amplifiki**!

Bertrando



La Mevo

La unusola japana popmuzika grupo, **La Mevo**, *publikigis novan kasedon,* **BLUO**, *kiu enhavas ok tute originalajn E-kantojn. Tie abundas niaj originaleco kaj unikeco en diversaj flankoj de* La Mevo.

BLUO *konsistas el sonbendo, tekstoj kaj vinilsako. Ĝi valoras aŭskulti almenaŭ unu fojon kaj eĉ aĉeti kaj posedi!*

ONO Takao



Recenzo

Laŭdire jam unu kasedo de **La Mevo** aperis; mi scias nenion pli pri ĝi krom ke ĝi eble estus ŝtonroko! **BLUO** tute ne estas tio. Ni taksu ĝin kiel iu varietea poproko, cetere multe pli milda ol roka, fakte plej parte blukolora kaj blusona: mi tie trovas ja iom tro da melankolio por mia gusto. Eĉ multe tro da: mi ne ŝatas melankolion, tute ne! La aŭskultado kaj recenzo iĝas despli malfacilaj...

Por mi multe mankas la vigleco de bona rokmuziko. Tamen mi aŭskultadis kaj reaŭskultadis "**BLUO**"n. Feliĉe por mi kelkaj pecoj elstaras dank al pli vigla ritmo. Kaj mi nun povas diri ke La Mevo perfekte majstras sian instrumentaron: efektive, samkiel **Solo**, **La Mevo** ne estas bando kaj ludas ĉion sola kaj krome ne kaŝas ĉion regi pere de komputilo kaj afable sendis al ni skizeton pri la instrumentaro.

Lia muziko bone surpiediĝas kaj agrablas aŭskulti. Bedaŭrinde lian voĉon mi malpli aprezas kaj trovas ke ĝi mankas pri iom da matureco, laborado kaj prilaborado. Kvankam plejofte sufiĉus iom pli da "efektoj" prilaborantaj la sonon de lia voĉo. Kelkfoje sufiĉe facile rimarkiĝas ke li ne ĉiam regas ĝin; aŭ eble li provas fari pli ol li kapablas, aŭ tutsimple ne kuraĝis ankoraŭ foje resurbendigi tutan pecon kie nur unu sola detaleto ankoraŭ ne taŭgas... kaj eble pli malsukcesi la novan surbendigon?

Jen ĝuste nun mi estas aŭskultanta la kanton kie tiu detaleto albatis mian orelon de rokmuzika sonteknikisto (do, laŭdire, jam duone surda!) Estas cetere aliaj, sed tiu ĉi estas la plej flagra kaj mi lasos vin trovi mem, ĝis sekvonta n-ro de Rok-Gazet'... ĉar mi vetas ke ĝis tiam vi havos la tempon mendi kaj ricevi la kasedon originale prezentitan, en vinilsaketo, sen tiu fuŝa plasta skatolo kiu ĉiam disrompiĝas, precipe dum poŝtado! Paroloj ne ĉiam kompreneblas, eĉ post pluraj aŭskultadoj, sed mi ankoraŭ ne legis la tekstojn kunmetitajn en la saketo! Ĉi okaze mi tamen tiklos la senteman nervon de nia amiko Georgo Kamaĉo, ke li klarigu al mi kion li komprenas pere de la kvara titolo: "Planeto 89"!

Fakte **BLUO** restas tute aŭskultebla kaj tekstoj sufiĉe klaraj. Ĉiu bona esperantisto ja devas havigi al si "**BLUO**"n ĉu por sia kolekto ĉu por enmeti en sian esparantan muzikotekon... ĉu ambaŭ!

Nun, post tuta kompreno de la tekstoj, mi povas aserti ke Ono ne malhavas humuron, eĉ se foje nigra ĝi estas! Plej nigra ĝi estas en "La Nova Ĉerko" kie rilatiĝas tute japana laborokazaĵo... El ĉio aperas ke Ono jam havas ielan grandan sperton pri la sorto de la vivo. Se vi ne konsentas mi ankaŭ konsilos reaŭskulti "Destin'" de Vladimir Soroka, precipe la duan flankon, kiu tre "proksimiĝas" al gepatra lando de Ono Takao... kaj eble tiam vi havos etan ŝanceon kompreni kion mi sentegas en la profundoj de mia animo (jes mi havas unu!), aŭskultante tiujn albumojn...

"BLUO" VKK9 , 50FF Ĉe VinilKosmo, EUROKKA

Bertrando

PERSONE EN LA SPEGULO

Jen naŭ pecoj. Kompreneble, multajn el ili hantas knabino; kompreneble, ofte ŝi estas for. El tiu repertuaro de perfidulinoj mi levos unu apartan kanzonon, «Ĉu neniam plu», kiu atingas stringi mian koreton. Ĝia ekzergo en la tekstokajero indikas ke «Bertilo insistas, ke estas bluso, tamen ne en rubuj'...». La hejma realismo de la aludita peco de la antaŭa kasedo cedis la lokon al pli aŭdaca amplekso kaj iomete da lirikeco (tio ne estas insulto). Tion ilustru tri splitoj:


Mi malfermas la okulojn, jen ankoraŭ unu tag'
La neĝo falas mole, kaj glacias jam la lag'
(...)
Nun vi kuŝas kun alia, li vin tenas kun fier'
Kaj ĉiuj miaj revoj kuŝas mortaj sur la ter'
(...)
Kaj ĉiam dumvespere pasas senespera ĉas'
De trinkejo al trinkejo por konsolo en la glas'



Cetere ia vasteco en ĉi tiu peco naskas nordian etoson, kaj ĉe tio ĝi fratas kun alia kanzono, «Neĝo dancas», prezentata kiel la oficiala balado de **Persone**. Tiuj du signas la fonton de la grupo, pli subtile ol intencis fari «La bonurbo» en la unua kasedo.

Neĝo dancas en la stratoj
jen sezono de mallum' kaj malfeliĉ'
vi atentu plej singarde
kontraŭ nokta superstiĉ'
lumigu kandelon
memoru en nokta hor'
mi ĉiam sopiras al via varma kor'

Kara, gvidu min trankvile
tra la stratoj de mallum'
ĝis ni kune ekrigardos
la vizaĝon de la sun'




Al ĉi tiu titolo mi agnoskas grandan majstrecon en la ekvilibro inter ĉiuj muzikiloj kaj voĉoj, kaj kvankam mi opinias ĝin iom tro glite glutebla, mi certas ke ĝi plaĉos al multegaj.

Tuj post tiu ĉi venas «Du homoj», lasta peco de la kasedo. Mi konfesu ke ĝi logas mian orelon pli per siaj lertaj rimoj kaj versa ritmo ol per sia muziko kaj kanto-melodio. Jen plukita ĉe la mezo de la kanzono:

Du homoj sur tero
sub la ĉiela blu'
tritaga afero
la vivo iras plu

Al nia kaŝita ĝarden'
vi nokte konfidis
sed jam en la posta maten'
ĝi ne plus validis
hej, mi nenion deziris
krom ke vi konfesu, ni kune sopiris



Aliloke mi preferas la muzikon ol la tekston, kiel en «Mi ne scias», kie la gitaroj gazelas. En «Alia mondo», la voĉo de Martin mirinde viglas; gratulon! Ĝi forskuas la glazuron kiu karapacas diversloke, ekzemple en la unuaj rekantoj de la refreno en «Ĉu neniam plu», aŭ en «Amanda».

Du pecojn karakterizas aparta tono en tiu naŭopo. «Folioj en la vent'», kiu ne tre konvikas min, kaj «En la spegulo», kiu radias impresajn bildojn poemajn kaj muzikajn, kaj esprimas miksitajn sentojn. En ĝi rimarkindas ankaŭ malofta delikata ĥoro.

Amiko mia lacas, sed sekretas la kial'
Li ploras dum la nokto, cerbumas dum la tag'
Li tenas la rideton ĉiutage en labor'
Kaj diras al neniu pri la sent' en sia kor'

Sed en la dormoĉambro rigardante al spegul'
Li vidas la profundon de la tim' en la okul'

Laste mi prezentas la unuan titolon, «Kio ajn», kie oni retrovas perfidulinon:

Tediĝis la knabino, ŝi ne volas plu
Espero vaporiĝis, via eno estas tru'

Sed oni ne larmadu, la sekvo instigas al ioma optimismo en ŝlagro-naska ritmo:

Ĉu natura leĝaro, ĉu dio
Tion fajfu vi nur
Vivo estas hazardo por ni

Kio ajn...
Povas okazi - kiam ajn



Ĉi tiun kanzonon, kaj «Amanda»-n, verkis kune Martin kaj Bertilo, sed kuraĝa Martin verkis sola ĉiujn aliajn kaj komponis la tutan albumon.... Li ankaŭ ĉefkantas ĉie. Kaj gitaras kaj tamburinas, dum Bertilo drumas kaj Anders basgitaras.

Oni povas legi pri multaj kunlaborintoj, inkluzive de «ĉiuj malfacilaĵoj de la vivo, kiuj provizas la materialon de niaj kantoj». La albumo estis registrita marte 1991 en Tamtam Studio, Stokholmo.

Kelkajn vortojn pri la kasedo konsiderata konkrete: Ĝia kovrilo estas pimpa kaj loga, la knabina koleto frandinda, la literoj vivoplenaj. Inverse, la desegnojn ene de la tekstokajero mi malpli laŭdas ol la simbolajn skizetojn de la unua tekstaro (*62 Minutoj*).


Ŝajnas al mi ke **Persone** nun tranaĝas sian klasikeman periodon. Lasinte unuatempajn amatorecon kaj senbridon, ili vestis sin per iom striktaj kostumoj kiuj ja donas al ili profesiecon kaj aplombon (for la hezitetoj de la unuaj kanzonoj), sed samtempe ligas ilian vervon. Mi foje havas la impreson ke la gejsero ne krevigas la kondomon. Estetike impona, **Persone** nun iom glacias ĉe la koro.

Sed mi certas ke en koncerto miaj oreloj kaj spirito mildiĝos sian kritikemon.

Kaj mi eĉ pli certas ke la sekvaj titoloj de Persone kuŝos en ronda maturo, kie tekniko kaj flamo kunlaboros sen ŝoki la kubutojn.

Finfinfine, singarde legu ĉi tiun recenzon. Mi faris neniun enketon tra Esperantio kaj sekvis nur min. Kaj mi kutime aŭskultas nur Mahler'on....

Recenzas LEO



glosoj

hanti: vizitadi kiel fantomo; obsedi
stringi: forte ĉirkaŭpremi
ekzergo: (ĉi tie) mallonga klariga surskribo
glazuro: briliga verniso (sur potoj, kaheloj...)

procesio multvalora...

Karaj Ankie, Marita, Marian kaj Nanne,



Oĉjo Flo petis de paĉjo recenzon pri via finfine eldonita dua kompaktdisko. Sed Marcel senĉese zorgas pri la organizado de "sia" kongreso. Tial li ne havas tempon. Mi do kaptas la okazon por publike gratuli kaj danki vin:

Vi ĉiam portas sunon al nia familio !!.

Ni jam tiel ofte aŭskultis, aŭskultigis kaj tiel oftege kunkantis vian unuan kasedon, ke delonge Mevina, mia baldaŭ trijara fratineto, kaj mi parkere ĥoras, ke...

"ni petas al ĉiuj infanoj de la tero,
fari multajn birdojn el papero,
por forpeli aermilitilojn,
ni kovru la ĉielon per pacarmiloj."

Al mi ege plaĉis via koncerto en Amboise. De tie mi konservis en mia memoro kelkajn melodiojn, kiujn mi tuj rekonis. Aŭskultante ĉi teknike perfekte registritan diskon plezuro tuj plenigas nin.

Kun la unuaj notoj nin kaptas kvazaŭfilmo, kies bildoj animos duonon de la enhavo (naŭ kantoj). Ni fariĝas spektantoj kaj aktoroj de tiu ĉi **"procesio multkolora"**, *kiu transportas nin tra magia panoramo. Tie muziko nur emfazas poezion kaj poezio muzikon. En vilaĝon de la "***KAJTO***-lando" alvenas* neordinara karavano, trupo de marionetludistoj. *Tiam la publiko, la pupoj, la artistoj kaj la maljuna majstro, ĉies voĉoj miksiĝas petoleme aŭ mokeme, fripone aŭ humile, gaje aŭ malĝoje...*

Mi trovas trista la fakton, ke la maljuna majstro decidas ne plu pupludi. Sed paĉjo diras, ke tiel fluas la vivo, ke ni ne malĝoju sed admiru tiun decidon lasi liberan lokon al pli junaj homoj. Tamen profunde pripensigas min la duboj de la maljunulo tenanta sian pupon:

" Kiu el la duo, kuplate per fadeno,
vivigas la alian: la ludisto aŭ la arlekeno ?"

Kaj fine ja ĉiuj infanoj revidas ankoraŭfoje la marionetojn. La karavano vojaĝanta de vilaĝo al vilaĝo eble iam venos ĝis nia Camarsac ?
Mi tiel sopiras al tiu buntkolora kaj vivoplena spektaklo !!!

Sur la dua parto de la disko ni retrovas martemojn. Kara kvaropo, vi majstre interpretas ilin. Profesinivele viaj instrumentoj lulas nin laŭ ondoj. Viaj voĉoj tiel harmonias, kiam ili kanone interplektiĝas... mi revadas... ni revadas...

La libreto, kiu akompanas la diskon, estas tre utila por mi, kiu eklernas legi en mia lernejo. Ĝi entenas la tekstojn de ĉiuj kantoj kaj iliajn temojn en dekunu naciaj lingvoj.

Eĉ se mi estas nur sesjara, ne kredu, ke mi laŭdas porinfanan diskon. Tiu ĉi recenzo fontas el tutfamilia analizo.


Ankie, memoru, ke ci esperis la eldonon de tiu juvela kompaktdisko antaŭ julio... antaŭ Julo ĝi alvenas. Bela donaco mendebla kontraŭ 100,-FF plus sendo kostoj ĉe Eurokka. La kasedoj baldaŭ sekvos, laŭdire komence de januaro.

Freneze aplaŭdante, entuziasme piedfrapante, daŭrigon petegante kun "la amaso mi hurlas:


Bis bis bis !!!

Sabrina Redoulez

PUPTEATRO







ROKMONDO

Rubriko *«Rockomondo»* aperas en franclingva profesia muzikgazeto *Le bulletin des rotations*, verkita de J.P. Moya. Ni elkore dankas ilin pro afabla permeso traduki kaj reprodukti ĝin. Ĉar en Francio, la epiteto *internacia* ofte signifas *angl-usona*, la celo de tiu ĉi rubriko estas prezenti rokbandojn el aliaj landoj. Eĉ esperantistoj kiuj kutimas tiaĵojn povos profiti.

Finnlando

The Kidneys: *«Alphabet People»*, *«Smile»* (7", Strawberry Records).

Electric Blue Peggy Sue and the Revolutionions from Mars: *«Hunger»*, *«Big Dipper»* (7", Spirit Records).

Necesus iam dediĉi tutan artikolon pri finna rokmuziko. Ĝi eksplodas pro diverseco kaj kvalito, precipe konsiderante ke tiu ĉi landeto havas apenaŭ pli ol kvin milionojn da enloĝantoj. Atendante, ni kontentiĝu je tiuj ĉi du disketoj ĵus aperintaj, kiuj atestas, ambaŭ laŭ sia maniero, tiun surprizan vivecon.

Ni komencu per **Kidneys**. Temas pri novuloj, ĉar la bando fondiĝis nur en junio 91: unu knabino kaj kvar knaboj el la antaŭurboj de Helsinko, kaj ilia ŝlosilvorto estas: **pop'**. Certas ke unuavice estas la melodiaj kvalitoj de la du titoloj kiuj unue frapas la orelon, kaj nur poste oni rimarkas detalojn: la voĉfreŝon de Mia Sauranen, la elegantan sobrecon de la aranĝoj, kaj ĉefe la perfektan akordiĝon inter la gitaroj kaj la violono. Por rapide montri situon de ilia muziko, oni povus elvoki **Sundays**, aŭ eĉ (sed la refero estas pli obskura) **Swirl** de Manchester. Fakte, pri la talento kaj originaleco de tiuj ĉi (tre) junaj finnoj neniu plu dubas, kaj en Anglio la reto MCM ne eraris elektante *«Alphabet People»* kiel «tutkontinentan furoraĵon». Des pli bela sukceso, ĉar tiu ĉi unua disketo eldoniĝis malpli ol du monatojn post ilia fondiĝo. Post jena esperiga komenciĝoo, surprizos se **Kidneys** longe restos enfermitaj en la finna merkato.

Kontraŭe al **Kidneys**, la muzikistoj de **Electric Blue Peggy Sue and the Revolutionions from Mars** (ho, kia nom'!) ne estas komencantoj. Fondita en 1986 en la regiono Oulu, norda Finnlando, la bando jam havas aktivon de kvin albumoj. Tiuj lasis memoron pri rokpunko efika kaj simpatia, sed ankaŭ iom plumpa. Kun *«Hunger»*, temas pri tutalia afer'. **EBPSATRFM** nur ĵus inventis la unuan diskon en *sensurround* (totala ĉirkaŭsensado). Ekde la unua takto, la ritma pistado vin umas plenplekte, kvazaŭ tiuj ĉi furiozuloj liverus unufrape ĉion kion ili kapablas. Kaj fakte, temas pri nur antaŭludo je tri minutoj da kataklisma ŝtonroka funko dum kiuj sinsekvas kantisto preta por frenezjako, teleskopado de eksterteraj larsenoj, kaj, kvazaŭ ĉaskrio, la plej panikiga gitarkoruso kiun mi de longa tempo aŭdis. Mi ne scias de kie **EBPSATRFM** ĉerpis tiun subitan energielspezon, sed jen la fakto: ĝi funkcias! Neeblas rezisti tiun sonlavangon, apud kiu la plej bonaj usonaj fakuloj de tiu ĉi ĝenro aspektas kiel amindetaj puntotrikistoj. Tiu ĉi renversa metamorfozo bonaŭguras la aperontan novan albumon *«Normal But Normal»*. Sismologio estas scienco kun brila estonteco.

Kontaktu ilin:

Kidneys: Strawberry Records, PL 17, SF 01351 Vantaa. Telefono: +358 0 753 63 35.

EBPSATRFM: Spirit Records, Oy Sonet Suomi Ab, Box 9, SF 02711 Espoo. Telefono: +358 0 509 31 00. Telefakso: +358 0 509 32 60



Hispanio

La Busqueda: *«La Rueda de la Fortuna»* (LP-disko, 3 Cipreses Records).

«Hispanio ne plu estas kia ĝi estis», diras turistoj kiam ili konstatas la malpezecon de sia monujo post ferio en tiu lando. «Nek hispana rokmuziko», oni emas aldoni. Post la freneza efervesko de *la Movida*, la bandoj de la *Nueva Ola* malrapide forvaporiĝas en la lokaj ŝlagrolistoj dum ni daŭre atendas usan renoviĝon.

Bonŝance, restas **La Busqueda**. La unua albumo de tiu ĉi majorka triopo, eldonita ambaŭflanke de Pireneoj printempe 1989, ricevis en Francio kuraĝigan akcepton, precipe en la suda duono kie la kanto *«Una promesa»* fariĝis furoraĵo. Rezulto: ili vendis trioble pli en Francio ol en Hispanio, kiu kaŭzis por la muzikistoj de **La Busqueda** mikssenton de kontento esti populara ekster sia lando, kaj de amaro senti sin kvazaŭ fremduloj en sia propra lando. Sed tiuj ĉi fieraj iberanoj, decidegintaj venki la hispanan merkaton, reaperas ĉijare kvinope, armitaj per nova albumo *«La rueda de la fortuna»*.

Troviĝas sur tiu ĉi disko la subtila mikso de modernismo kaj tradicio kiu markis la forton kaj karakteron de la antaŭa disko. Sed kontraŭe je tiu, kiu esploris la plej melankoliajn aspektojn de mediteranea kulturo, *«La rueda de la fortuna»* superverŝas je vivoforto kaj optimismo. Ĉi tie oni ofertas al ni varman, luman, kaj koloran Hispanion, ankaŭ malfermitan je la mondo: aldone al hispanaj gitaroj kaj kastanjetoj, venas novaj influoj sudamerikaj (kongoj, mariaĉioj) kaj nordafrikaj (daburko, bendiro), neforgesante bonan dozon da elektro. La brila rezulto jam klasas *«La rueda de la fortuna»* inter la plej bonaj ĉijaraj sukcesoj de hispana roko.

Kontaktu ilin:

La Busqueda: 3 Cipreses Records, Dro S.A., Francisco Remiro 5-7, E 28028 Madrid. Telefono: +34 1 245 40 00. Telefakso: +34 1 246 60 00.

J. P. Moya
por «Radio Primitive»
92,4 FM en Reims
- tradukis RoKo





malrok-muziko

Pri la Internacia Ĥoro

Laŭ ideo de prof. D-ro Humphrey Tonkin, longjara prezidanto de UEA, en 1980 dum la UK en Stokholmo fondiĝis la Internacia Esperanto Ĥoro.

"Kuniĝu ni per nia kant'" estis la devizo per kiu kolektiĝis 15 kantemuloj el diversaj landoj je la unua ekzercado (5/8/1980) sub la gvido de la bulgara ĥorestro Dimitar Terziev. Post kvar tagoj la nombro de la partoprenantoj duobliĝis kaj dum la unua prezentado de la IEĤ (9/8/80) 30 geĥoranoj el 9 landoj prezentis antaŭ la kongresaro du kantojn: "Paca kanto de la Esperantistoj" kaj "Kanto de l' Ligo" de Mozart.

Poste, preskaŭ ĉiujare la geĥoranoj multobliĝis, ekzercis dum la Ukoj kaj novaj kantoj eksonis en la grandaj kongresejoj. Kutime ĉiu jare la ĥoro plenumas, krom la aliajn kantojn, kanton dediĉitan al la kongresa lando. La geĥoranoj kolektiĝis sinsekve dum la UK en Antverpeno (1982), Budapeŝto (1983), Aŭgsburgo (1985), Varsovio (1987), Roterdamo (1988), Brajtono (1989), Havano (1990).

Dum la Jubilea 72-a UK en Varsovio, inter ok plenumitaj kantoj estis la premiita de la belartaj konkursoj UEA, kanto de la ĥorestro D. Terziev: "Jubilea kanto por Esperanto".

La dekjaran jubileon de la IEĤ oni festis dufoje.

Je la fino de junio 1990, la ĥoro festis sian jubileon en Bulgario. En IEK-Pisanica kolektiĝis 27 ĥoranoj el Germanio, Anglio, Aŭstrio, Belgio, Israelo, Pollando,, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Francio, Italio, Sovetunio. Partoprenis ankaŭ E-ĥoro el Litovio - Urbo Panevejis kun ĥorestrino Elena Grumbiniene kaj E-ĥoroj el Bulgario - el Pazarĝik kun ĥorestro Angel Cenov, el Stara Zagora kun ĥorestro Toni Komitov, el Gorna Orjahovica kun ĥorestro Enĉo Balanov kaj el Sofio kun ĥorestrino Katja Vuĉkova. Krome 35 individuaj bulgaraj geĥoranoj partoprenis la jubileon, entute 136 partoprenantoj!

Tage ĉiuj geĥoranoj provkantis kaj vespere diversaj ĥoroj kaj grupoj koncertis. Post la sukcesa prezentiĝo de la IEĤ en la montara urbo Ĉepelare, la geĥoranoj forveturis al Sofio por la jubilea koncerto.

La programo komenciĝis per la devizo "Kuniĝu ni per nia kant'". Ĝi konsistis el la plej ŝatataj kantoj, plenumitaj dum la dekjara periodo. Sub la gvido de ĝia ĥorestro Dimitar Terziev, oni plenumis "Bonvenon" teksto kaj muziko de I. Szabo kaj de L. Zsoldos, "Paca Kanto" laŭ germana melodio, la oratorion "Signo de l'esper'" de Haendel en akompano de trio "Sirings" fluto - Maja Sergieva, hobojo - Teodora Kostava kaj fagoto - Ljuba Mânzova, la anglan kanton "Bonan nokton" kaj la havajan "Disiĝo"n, "Jubilean festkanton por Esperanto", "Ekflugu nia Esperanto-kant'". Dum la dua parto de koncerto kantis virinaj ĥoroj el Stara Zagora kaj Gorna Orjahovica, E-ĥoro de la instruistinoj el Pazarĝik kaj miksa ĥoro el Litovio.

Kiel solistinoj kantis la ĥorestrino E. Grumbiniene, Lois Hainsworth - Anglio, Aleksandra Verĥova - Sovetunio, Irina Sĉubak - Pollando, Margareta Ŝarf - Aŭstrio kaj Lili Dokova - Bulgario.

Fine de la koncerto eksonis "Himno de ĝojo" el la naŭa simfonio de Beethoven.

Tre emociita, Dimitar Terziev dankis al ĉiuj geĥoranoj, kiuj venis el diversaj partoj de la mondo por festi la jubileon. Li menciis en kronologia vico la manifestiĝojn de la ĥoro de 1980 ĝis nun kaj samtempe prezentis al la publiko la aktivajn kantantojn. Al ĉiuj oni donacis florojn.

La jubilea koncerto estis pruvo pri lia majstra laboro.

Kaj denove dum la 75-a UK en Havano, eksonis "Kuniĝu ni per nia kant'" unuafoje surtere de la okcidenta parto de la terglobo. La IEĤ prezentis sin dum la internacia vespero per ses kantoj, inter kiuj estis la speciale komponita de Lubomir Huf "Himno de Havana U-Kongreso", eklernita dum la kongresa semajno.

Partoprenis la IEĤ ĉirkaŭ 60 geĥoranoj, precipe el Kubo kaj ankoraŭ 17 landoj el Ameriko, Eŭropo kaj Azio.

Kiel solistinoj kantis Ibis Zamora el Kubo kaj Jenny Bishop el Anglio. Akompanis per la piano Staneŝnikova Galina el Moskvo.

La sekvanta prezento de la IEĤ okazos dum la 76-a UK en Bergeno, Norvegio. Tiam la Ĥoro komencos sian duan dekjaraĝan vivon.

Sonja Tiĥova, Bulgario



16 kanzonoj

Dank al penado de **Boris Tokarev** el Moskvo, aperis notkajero pri Esperanta muziko. Ni trovas en ĝi "La Espero"n, himno Esperanta, kantojn je la poezio de L.Zamenhof "Mia Penso", "Ho, mia kor", "Al la fratoj", " La vojo", "Pluvo", kaj aliaj kanzonoj. Estas kelkaj komponitaj de B. Tokarev mem. (Gratulojn al li de EUROKKA!)

Enestas ankaŭ rusaj tradukoj de vortoj, kaj la kajero entenas entute dek ses kanzonojn. Ĝi estas tre taŭga kaj utila por diversaj junaj EK en kiuj estas muzikistoj.

Mendeblas ĉe EUROKKA!

La 7ª Junulara Festivalo

de esperantaj poezio kaj kanzono

okazos kiel kutime en la urbo Bydgoszcz de la unua ĝis la tria de majo 1992.

La festivalon povas partopreni gelernantoj kaj studentoj ĝis 22-jaraj. Ĝi estas organizata en du kategorioj: recitado kaj kantado.

Po du pecoj en ambaŭ fakoj, en Esperanto por daŭro kvar- ĝis ses-minuta (laŭ fako). Ĉiu partoprenanto povas aliĝi al unu kategorio aŭ al ambaŭ. Por la kantantoj la organizantoj aranĝos akompanan muzik-ensemblon.

Partoprenkotizo (du tranoktoj kaj manĝado) estas 50 ned. gld.

Por pli bone prepari sin por la festivalo estas proponata speciala ekzerca semajno (2-9 februaro 92) ankaŭ en Bydgoszcz. Kostas, kun sep tranoktoj kaj tri manĝoj ĉiutage, 200 gld.

ZESPOL SKOL HANDLOWYCH
STRATO KALISKA 10
PL 85-094 BYDGOSZCZ



Seán Osborne, Kontratenoro

Seán OSBORNE naskiĝis en Belfasto, Nord-Irlando, kaj studis la kant-arton private kun John Carol Case kaj kun W. MacAlpine ĉe Guildhall School en Londono. Freda Parry Memorial Scholarship premiis lin per stipendio, kaj NoJEF ebligis al li partopreni la unuan "Concours Mondial de Chanson Esperanto" en Clermont Ferrand, Francio, kie pokalo aljuĝiĝis al li per voĉdono de la publiko.

Li aperis en dek landoj, sur podioj kaj scenejoj. En plej multaj lokoj li aperis soliste. Li kantis en deksep lingvoj kaj krome, kompreneble, en Esperanto.

Inter eminentuloj kun kiuj Seán laboris mi retenis nur Leonard Bernstein...

Lia kariero ampleksis ĉian muzikon inter la baroka (lia specialaĵo kaj plej ŝatata) ĝis la moderna. Li solkantis kaj ankaŭ aktoris ĉefrolojn en West Side Story kaj aliaj muzikaj komedioj. Sur Rok-Muzika kampo, Seán kantis ĥore kun la grupoj Mandalaband kaj Procol Harum; en la unua brita prezento de la rok-opero *Mass* de Leonard Bernstein li kreis la rolon de Rock Singer, kaj Noel Pearson, la konata film- kaj teatro-produktisto, engaĝis lin dubli la ĉefrolon de Frederick en sia sukcesa rok-versio de la opero "The Pirates of Penzance".

Planado por la estonteco inkluzivas interalie: laboron por la ĵurio de la sekcio kanto en la Beletraj Konkursoj de UEA kaj kompaktdiskon pri la historio de kontratenora voĉo por kiu la membroj de Kajto jam konsentis kunlabori en unu-du numeroj.

Bonan tagon la paco

Bonjour la paix

Jen granda projekto de nia amiko Jacques YVART, kiu konkretiĝas: temas pri albumo kies temo estas la paco. Tiu albumo estas nun eldonita en kompaktdisko kaj kasedo:

enhavo:

- LA KANTO DE LA PACO: poemo de Louis ARAGON, france, muziko de J. Yvart
- PACO AL BALENOJ: teksto de Paul HEBERT, france, muziko de J. Yvart
- MIA TERO: franca teksto de J. Yvart, muziko de Nicolas CARR
- ESTI PACIFISTO: ekstrakto de "Homo Sanguinarius", de Jean ROSTAND, muziko de J. Yvart
- AL JUNAJ MORTINTAJ SOLDATOJ: Poemo de Emile VERHAEREN, muziko de J. Yvart
- AL KAG: Ĉada ripetkanzoneto
- BERGOAJ ĜARDENOJ: muziko de J. Yvart
- LA MILITO: paroloj kaj muziko de Georges BRASSENS, franca neeldonitaĵo.
- MI NE POVAS FORGESI: ekstrakto de "Refus d'obéissance" de Jean GIONO, Muziko el "Köln Concert", de Keith JARRETT
- LA PACO VENOS EL NIA POPOLO: kanto de indianoj Chippewa, teksto de J. Yvart
- AH, AM' POR LA AM': ESPERANTIGO DE "L'AMOUR POUR L'AMOUR", originala teksto de HAIRABEDIAN, muziko de J. Yvart, Esperantigo de Nanne KALMA el KAJTO.

Aranĝoj kaj orkestro-direktado: Philippe SERVAIN; produktita kun la konkurso de *ADAMI* kaj la *Fondaĵo por muzika kreado*. Kun subteno de *ELAN* - revuo poezia, literatura kaj pacifista - kaj de la *MONDCIVITANOJ*.

AH, AM' POR LA AM', sola esperantaĵo de la albumo, estas nedifinebla poezikanto kun reva grandmuziko kaj ŝvebanta etoso, iom mistera.



Ĉu muzikaj steloj brilas super Eks-SOVETUNIO?

Kion eblas rakonti pri Sovetia E-muziko? Mankas ĉio, krom deziro eldiri proprajn pensojn! Mankas altnivelaj muzikiloj, teknika aparataro estas produktita en "ŝtona epoko de elektroniko". Ĉi etoson brile priskribis en unua numero de Rok-Gazet' Oleg Svirskij("rakonto el Ribinsk"[1)20]), mi ne volas ripeti. Mi volus rakonti pri iom alia direkto de la E-muziko, tiel nomata "Amatora kanto". Ruse: "Aŭtora kanto", France "Ŝansonje"(? prononcu esperante!), Esperante, "Bardo".



Kio estas "Amatora kanto" en Sovetunio? Havante amatorajn fontojn, kreskante el bona fruktodona tereno de folkloro, urba romanco, turistaj kaj studentaj kantoj - amasa verkado produktis novan specon de profesiuloj - kun profesia artnivelo, sed sen profesia salajro. "Amatora kanto" naskiĝis en sesdekaj jaroj, dum tiel nomata "politika printempo en Sovetunio, dum tempo de grandaj eventoj, ligitaj kun esperoj je renovigo kaj plibonigo de socio kiel kontraŭilo al "amasa kulturo" - senanima, sensenca, kiu tiam abundis (kaj ankaŭ nun ne disfalis). Ĝi luktis por konservi animon de popolo, konservi purajn fontojn de la Kulturo.

Ĉiuj aŭtoroj ne similis unu la aliajn, havis propran "vizaĝon", propran "verkmanieron". Ili estis pensemaj homoj kaj verkis por pensamaj homoj. Vladimir Vysockij, Aleksandr Galiĉ, Jurij Vizbor provis paroli kun ni per alia lingvo, kiu ne sonadis de estrado, sed kaŝiĝis en animoj. Kiu el ni provis prononci vortojn de famaj "podiaj" muzikaĵoj sen muziko? Ĉu vi sentis animon en ĉi kiĉo? Sed oni nomas ĝin "revelacio"! "Amatora kanto", laŭ opinio de fama Sovetia bardo Bulat Okuĝava, *"strebas flankiĝi de junuloj, kiuj bonege gitarludas, kapablas kanti kaj verkas kantojn pri nenio ! "*.

"Amatora kanto" ne falsas, ĉar neniu estas devigata aŭskulti kaj ĝui ĝin, sidante nokte ĉe lignofajro en diversaj lokoj, neatingeblaj por "normalaj homoj". Amaskomunikiloj ĝin ne "karesas", sed inter veraj ŝatantoj multnombre disvatiĝas kasedoj kun diversaj voĉoj, kiujn kunigas nur Amo, Kredo kaj Espero. Espero - Esperanto.

Esperanta amatora kanto plene respegulas la "patrinon". Nokto. Fumo de lignofajro, rondo de amikoj. Gitaro, premata per diversaj fingroj. Tremantaj animoj. Nur en ĉi etoso eblas ĝui E-amatoran kantadon, kaj nur tie brilas steloj, naskiĝas steletoj el fajrero de lignofajro. Tiuj ĉi kantoj entenas la aromon de lignofajro, la ĝojon de renkontoj, la ĉagrenon de disiĝoj; filozofiaj meditoj alternas kun indigna protesto... "Aŭtora kanto" - tio estas seriozaj pensoj pri la homa vivo kaj pri viva homo.





Jurij Pasečnikov

Dum longa tempo "fera kurteno" kovris Sovetunion. Tio koncernas ankaŭ muzikistojn. Preskaŭ ĉiuj kluboj havas proprajn "stelojn" kaj "steletojn". Nun mi volas, por plivastigi rok-reton de Rok-Gazet', prezenti al vasta publikaro kelkajn plej elstarajn stelojn de nia muzika firmamento.

Mihail Povorin (Moskvo) 18/03/1962. Kemiisto-esploristo, posedas sep lingvojn. Komponas muzikon kaj tekstojn ruse, angle, Esperante. "Viva kantaro" - tiel nomas lin konatuloj. Kantoj, kiujn li plenumas, sonas ĝuste en aŭtora varianto, sed samtempe li aldonas nevideblan, preskaŭ nesenteblan parteton de animo.

Tatjana Petuŝkova (Moskvo) 27/11/1959. Profesia muzikistino, naskiĝis en urbo Jelec, nun loĝas en Moskvo. Gvidas porkomencantajn E-kursojn. Muzikon verkas mem, tekstoj plejparte estas verkitaj (aŭ elrusigitaj) de G.V.Gluhov (Jelec) kaj L.Jevsejeva. "Mia viv-historio? Mia profesio - muzikistino. La muzikon verkas de infaneco. Sed komencis verki en Esperanto nur ekde 1987-a jaro kaj komprenis, ke trovis tion, kion mi delonge serĉis por mia animo..."

Evelina Sokolova (Krasnojarsk) 22/12/1970. Profesia muzikistino. Brilaj voĉo kaj ludmaniero. Plenumas kantojn verkitajn de aŭtoroj famaj en Sovetunio: A.Juravljov, O.Semjonova, Je.Habarov kaj aliaj el urbo Krasnojarsk.



Mihail Bronŝtein (Tihvin, Leningrada regiono). Famega iam, aŭtoro plenumanto. Nun pro diversaj kaŭzoj, iom deiris de vasta aktiveco, sed liaj kantoj konstante sonas dum E-aranĝoj.

Andrej Obrezkov (Ivanovo) 19/01/1963. Profesia pedagogo. Verkas muzikon mem, tekstoj parte de O.Obuhov (Ivanovo), parte el diversaj fontoj. "Enciklopedio" de rusa kaj E-kantoj. Kantas ankaŭ angle.

Ĵomart Amzejev (Ĉimkent) 27/02/1955. kaj Nataŝa Gerlaĥ (Ĉimkent) 27/09/1968. [1)6]intervjuo far mi-mem -[2)14]. Ĉi dueto estas plej elstara, plej konata, populara kaj amata en Sovetunio kaj, antaŭ ne longe, eksterlande. En 1989 eldonis disketon "Somera mondo" enhavanta kvar kantojn (havebla ĉe VinilKosmo - EUROKKA ref.VKDT2). Pri ĝi M.Lineckij, prezidanto de kieva centra E-klubo skribis sekvajn liniojn: "Malgraŭ ke la disko estas malgranda, tiom da sentoj kaj liriko, plenigintaj la kantojn, sufiĉus por granda. Por Ĵomart somero estas ne nura sezono. Por li somero estas simbolo, sinonimo de la tendaroj, renkontiĝoj, kie kunvenas malnovaj intimaj amikoj. En tiu atendo naskiĝas mildaj, sopirantaj pri somero kantoj de Amzejev. Nomoj de la kantoj (Sopiro, letero, Somera mondo, Vojo - Ju.P.) montras humoron de la aŭtoro dum longaj aŭtunaj kaj vintraj vesperoj. Tre harmonie sonas voĉoj de Ĵomart kaj Nataŝa - ankoraŭ unu sukcesa kuniĝo, sed ĉi foje - de la voĉoj kaj animoj...". Pli detalan informon pri ili vi povas legi en Rok-Gazet' N-ro1.

Jurij Pasečnikov, Tomsk, 7-a de majo 1991

Folioj de mia memoro, deknaŭ-titola kasedo, kun la tekstoj, sekvas la disketon (ankaŭ havebla ĉe VinilKosmo - EUROKKA, ref: VKK8)

TUTE NE GRAVAS

Rafael BLANCO skribas al ni responde al kritiko fare de Anĉjo en lasta numero [2)20] rilate indianon, tenanta armilon siamane[1)7]:

PRI "TROVAĈAĴOJ" KAJ ALIAJ:

En la dua numero de Rok-Gazet' Anĉjo forte kritikas aperigon de enir-bileto kie staras batalante indiano tenanta armilon.

Mi respondecas pri tiu artikolo ĉar mi mem sendis kaj tekston kaj fotojn (tiukaze enirbileton). Tial mi klarigos kaj kialigos tiun aferon donante pliajn pripensojn por la debato:

1) Aperigo de homo portanta armilon ne indikas nepre apogon al perforto. Ĝi estas nur simpla ilustraĵo, almenaŭ tiukaze; do, ne skandaliĝu.

2) Malgraŭ ke vi nur mencias FSLN mallongigojn, ankaŭ aperis FMLN kiu ne estas ŝtatarmeo.

3) Ĉu tiuj aludoj al la novnaziuloj, Sadam Hussein ..., celas kompari ilin kun la amerikaj geriloj? Kiusence?

4) La ĉiama kaj sankta neŭtraleco E-a! Neŭtraleco ne signifas kaŝi kaj eviti la realon. La informado devas esti ĉiuflanka.

5) Me esperas ke ĉe Rok-Gazet' okazu neniu ajn cenzuro, ĉar la kialo *(kaj kriterio Ndlr)* por aperigi ilin devas esti la kvalito *(de la enhavo, precipe, la ceteron - kaj eble eĉ pli! - ni povas korekti... Ndlr)*, kvankam multaj tekstoj pri perforto kaj malamo (same kiel pri amo kaj paco) estas aĉaj kaj enuigaj! *(Rok-Gazet' bonvolas esti ĉio, krom enuiga! Ndlr)*

Paceme RB

Senrespondece: ke tiuj kiuj, junaj, neniam ludis kun plumbaj soldatetoj, akvo-revolvero, plasta pistolo kaj tiel plu aŭ eĉ nur mimante armiltenon, bonvolu (eĉ malbon-volu!) ĵeti unuajn ŝtonojn!

Letero pri Moragriega

Saluton!

Unue mi volas gratuli vin pro via laboro en junaj eroj kiel radio, rokmuziko, ktp. Mi pensas, ke vi havas pravan linion anstataŭ tiu reakcia E-agado, kiu nun ankoraŭ vivas de la jaro 1887.

Mi ŝatus, ke vi, redakcio, kaj vi, legantoj, atentu pri jena novaĵo.

En la hispana ŝtato hodiaŭ vivas miloj da konsiencobĵetantoj; du mil el ili estas «malsubmetantoj» (katalunlingve *insubmisos*).

La malsubmetantoj estas konsciencobĵetantoj kiuj agnoskas al neniu tribunalo la rajton juĝi ilian konsciencon. Temas pri civitanaj malobeantoj leĝe persekutataj. Teorie tiuj du mil malsubmetantoj devus iom post iom iri en malliberejon. Kaj oni pensas ke la ŝtato havos sufiĉan kuraĝon fari tion, do ili estas/us politikaj prizonuloj.

Hodiaŭ estas nur sep malsubmetantoj en malliberejoj de la Hispana Ŝtato kun punoj ĝis tri jaroj. Sendube tiu nombro kreskos: same kiel ankaŭ la nombro da liberaj malsubmetantoj.

Unu el tiuj politikaj prizonuloj estas 24-jara kataluna studento pri geografio kaj historio en la Barcelona Universitato. La Militista Tribunalo de Barcelona punis lin je 13 monatoj da mallibero. Hazarde li enkarceriĝis okaze de la Internacia Tago de Konsciencobĵetado. Nun li eklernas esperanton, kaj li ŝatus korespondi kun gejunuloj, pri politiko, muziko, vivo, amuziĝo, kio ajn. Li ŝatus korespondi ankaŭ kun kiu ajn L.S.G.-ano.

Se eble, mi petas vin sendi al li revuojn, kasedojn, librojn, kion ajn por ke li estu pli feliĉa, konstatu vian solidarecon kaj la utilecon de esperanto. Li vin amos dumvive, li nun ne scias kio estas libereco ĉar li ne volis uzi la armilojn....

Skribu tuj al li en lingvoj kataluna, hispana, franca, aŭ facila esperanto:

Josep Maria Moragriega i Andrés
Prisión Naval Sta. Lucía
E 30290 Cartagena (Murcia)



Eksterordinara muzika kongreso...

47a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

BORDEAUX - 17/21-APRILO-1992

MUZIKO KAJ ESPERANTO



La rekta influo de la partopreno de junaj aktivuloj en la Organiza Kongres-Komitato esprimiĝas per aparta karaktero aldonita al la venonta SAT-Amikara Kongreso (17-21 aprilo 1992 en Bordeaux). Efektive la servoloko rezervita al la gejunuloj estos nekutima: ili estos ĉie !!! Interalie ili zorgos pri la animado de la tuta, tre riĉa, kultura programo.

Ni do povas jam anonci al vi tre aktivan kongreson, kun efektiva partopreno de la ĉeestantoj, kiuj ne enuos, kaj viglan etoson (pluraj samtempaj programeroj ebligos elekton laŭ ĉies gusto !).

Akceptonte vin en la regiono, kie naskiĝis la unuaj trobadoroj*, ŝajnis evidente, ke ESPERANTO-GIRONDE elektu kiel kongrestemon:

"De Mozart ĝis Eurokka
MUZIKO kaj ESPERANTO
Kompliceco de du internaciaj lingvoj"



Kial "De Mozart ĝis Eurokka" ? Ĉar ni ja kantos kaj dancos laŭ ĉiuj ritmoj kaj laŭdire Mozart ja estis la unua rokmuzikisto !!! Jen senvualigita sekreto, ĉu ne ? Tiun temon prikantos ilustritaj prelegoj, kiel ekzemple : *"BIOMUZIKO, aŭ la influo de la diversaj muzikstiloj al la menso kaj la korpo"* prezentota de Iñaki GAUNA (Eŭskio); ankaŭ *"Prezentado de Eurokka"* gvidata de nia FLO !

Saskia VEEN, harpistino, kaj Edward HOEPELMAN, tenoro, lulos klasikemulojn. Pli movplena estos la kabareto kun eŭskaj kantoj kaj gaskonaj popoldancoj. Sed la malfermo de nia kongreso al la junaj ĝirondianoj trafos sian zeniton dum la E-roknokto ! Tiam sinsekvos sur la scenejo de la loka kulturcentro : SOLO kaj LA ROZMARIAJ BEBOJ !!! La petolemajn idojn de la tuluza rokaro oni tie atendas kiel stelgrupon. Loka bando restas kontaktinda por enkonduki la koncerton.

La feliĉaj partoprenantoj de la kongreso estos do invitataj ĝui plej eble multdiversajn stilojn kaj ritmojn.

Nur kiuj tute ne ŝatas muzikon, tiuj rajtas preteksti kapdolorojn por rifuzi nian inviton.

LEGANTOJ DE ROK-GAZET' VENU MULTNOMBRAJ !!!

Petu informojn kaj mendu aliĝilojn ĉe:
S. BERNARD, 171 avenue R. Poincaré,
F-33110 LE BOUSCAT.

(*la plej malnova konata trobadoro de la franclingvaj teritorioj estas la Duko de Akvitanio VILHELMO la IX[a] -1088-1127)

47a Kongreso de SAT-Amikaro

17-21 aprilo 1992 - Bordeaux

NOMOJ DE MUZIKSTILOJ

(Daŭrigo)

ĵuĵuo, ĵuĵumuziko *juju*. Populara muziko el Niĝerio. Parenca al, sed pli malrapida ol hajlajfo. *Blue Spots; King Sunny Ade; Ebeneezer Obey.* Vd afro-, bakango, ĉimurengo, hajlajfo, kvelao, makoso, sukuzo, palmvina muziko.

kaĵuno, kaĵunmuziko *cajun*. Vigla dancmuziko kreita de la kreoloj de Nov-Orleano, karakterizata interalie de la kaĵuna akordiono. *Queen Ida.* Vd zajdeko.

kalipso, kalipsmuziko *calypso*. Muzik- kaj danc-stilo naskita en la Karibea insularo. *Harry Belafonte.*

kampara bluso *country blues*. Nomo de frua formo de bluso, kreita en la delta regiono de Misisipo kaj partoj de Teksaso kaj Arkansaso. La kamparablusistoj uzis akustikan gitaron kaj harmonikon, kaj kantis kun alta naza voĉo. *Blind Lemon Jefferson; Mance Lipscomb.* Vd delta bluso, urba bluso.

kantrio, kantrimuziko *Country (and Western)*. Usondevena muzikstilo iom parenca al blugraso sed kun pop- kaj rokelementoj. *Jimmie Rodgers; Hank Williams; Waylon Jennings; Emmylou Harris; La Barbuloj.*

kanzono *song, ballad*. Sufiĉe simpla kanto, en kiu plej gravas la teksto. Ordinare por sola kantisto kun malmulta akompano, ekz. nur akustika gitaro. *Edith Piaf; Gianfranco Molle; Ĵak Lepuil; Joëlle Rabu.* Vd balado.

kongoĵazo, kongoĵazmuziko *congo jazz*. Vd sukuzo.

kvelao, kvelamuziko *kwela*. Sud-Afrika muziko kreita en la 30-aj kaj 40-aj jaroj el ĵazo. *Manhattan Brothers; Miriam Makeba.* Vd afro-, bakango, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, makoso, sukuzo.

Latin-Amerika ĵazo, latinĵazo *latin jazz*. Ĵazo kun forta influo de Latin-Amerika muziko.



Latin-Amerika muziko, latinmuziko *latin (music)*. Komuna esprimo por la diversaj specoj de muziko devenantaj de Latin-Ameriko. Ilia komuna karakterizo estas verva plurritmo. Vd sambo, salso, bosanovo, rumbo, ĉaĉao, Latin-Amerika ĵazo, Latin-Amerika roko.

Latin-Amerika roko, latinroko *latin rock*. Roko kun forta influo de Latin-Amerika muziko. *Carlos Santana.*

makoso, makosmuziko *makossa (music)*. Speco de rapida hajlajfo el Kameruno. *Manu Dibango.* Vd afro-, bakango, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, sukuzo.

media muziko *ambient music*. Muziko kreita por esti etosokrea fono en certa medio, kontraste al muziko kreita por esti atente aŭskultata. Vd muzako.

mentoo *mento*. La nacia danco de Jamajko kaj ties muziko. Ritme parenca al kalipso kaj rumbo kun okonaj notoj jene grupiĝantaj: 3 + 3 + 2. Vd skao.

metalroko, metalrokmuziko *heavy metal*. Speco de laŭta kaj agresa rokmuziko, en kiu dominas distorditaj elektraj gitaroj. *Jimi Hendrix; Deep Purple; AC/DC; Van Halen; Europe.* Metalroko evoluis el la ŝtonroko fine de la sesdekaj jaroj. Ekzistas pluraj modernaj specoj de metalroko, kiel rapida metalroko kaj damna metalroko.

minimumismo *minimalism*. Iu ajn muzika stilo, kiu emfazas ripetadon de simplaj elementoj. En roko punko estas foje konsiderata minimumismo. En la "serioza" muziko *Steve Reich* kaj *Philip Glass* estas konataj minimumistoj.



motaŭno, motaŭnmuziko *motown.* Speco de Usonnegra popmuziko bazita sur gospelo, soulo kaj ritmenbluso. *Temptations; Supremes; Stevie Wonder.*

muzako *muzak.* Tiu senarta speco de media muziko, kiun oni povas aŭdi en supermerkatoj, restoracioj, liftoj kaj aliaj publikaj lokoj. La vorto estas ofte uzata kun malŝata nuanco. Vd media muziko.

muzikalo *musical.* Speco de popularmuzika opereto. Sceneja kaj/aŭ filma. *My Fair Lady; Fiddler on the roof; Evita.*

Nov-Orleana ĵazo, Nov-Orleana ĵazmuziko *New Orleans jazz.* De kelkaj konsiderata la unua speco de ĵazo, sed laŭ aliaj ĵazo kreiĝis en la negra subkulturo samtempe en pluraj lokoj en Usono (Nov-Orleano, Kansas-Urbo, Sankta Luizo, Ĉikago ktp.). *Oliver's Creole Jazz Band.* Vd Diksilando.

ojo, ojmuziko *oi (music).* Muzikstilo ligita al la haŭtkapuloj *(skinheads).* Parenca al punko. *4-skins; Splodge; Blitz.*

palmvina muziko *palm-wine music.* Speco de akustika gitardominata Afrika muziko parenca al hajlajfo kaj ĵuĵuo. *Kwaa Mensah.* Vd afro-, bakango, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo.

popo, popmuziko *pop (music).* **1** Muzikstilo varianta laŭ la tempoj kaj modoj, sed normale karakterizata de dancebla ritmo kaj/aŭ facile memoreblaj melodioj kaj tekstoj. *Irving Berlin; Frank Sinatra; Gilbert Becaud; Monkeys; Tom Jones; Abba; Ala Pugaĉova; Lionel Ritchie; Madonna.* Vd poproko, ŝlagro. **2** EVITINDA. Mallongigo de populara muziko, tiel inkluzivanta pli-malpli ĉiujn muzikstilojn, pri kiuj interesiĝas la grandaj popolamasoj.



poproko, poprokmuziko *pop rock.* Rokmuziko kun multaj el la ecoj de popo. *Beach Boys; Beatles; Eagles.*

psikedela roko, psikedela rokmuziko *acid rock, psychedelic rock.* Speco de roko, kiu provas krei efektojn similajn al tiuj de drogoj. *Grateful Dead; Frank Zappa; Pink Floyd.*

punko, punkmuziko *punk (rock).* Speco de agresa roko de la sepdekaj jaroj, kiu pretendis reiri al la simplaj fundamentaj ecoj de roko. *Ramones; Sex Pistols; Clash.* Vd ojo.

ragtimo, ragtimomuziko *ragtime.* Pianostilo evoluigita komence de la 20-a jarcento en Usono. Neimprovizata, sed tamen ofte konsiderata ĵaza. *Scott Joplin.*

rapida metalroko *speed metal.* Speco de tre kompleksa metalroko ludata en altega rapideco. *Metallica.* Vd damna metalroko.

regeo, regemuziko *reggae.* Muzikstilo evoluinta el skao kaj rokstedio en Jamajko fine de la 60-aj jaroj. *Bob Marley; Peter Tosh; Steel Pulse.* La tipa "renversita" regeritmo forte influis la pop- kaj rokmuzikon. Vd skao, rokstedio, unuforlaso.

repo, repkantado, repmuziko *rap, rapping, rap music.* **1** Speco de funko karakterizita de rapida ritma parolado. Populariĝinta fine de la 70-aj jaroj. **2** Tia ritma parolado. *Sugar Hill Gang; Grandmaster Flash.* Vd skato.

ritmenbluso, ritmenblusmuziko *rhythm and blues.* Muzikstilo kreita el bluso en la 40-aj jaroj per aldono de forta danca ritmo. *Louis Jordan; Fats Domino; B. B. King.* Ritmenbluso, kiu estis negra muziko, eknomiĝis/fariĝis rokenrolo kiam la blankuloj adoptis ĝin. Vd soulo.



ROK–
BANDOJ



Kredo baldaŭ konfesos

Ni jam parolis kaj rakontis pri "**KREDO**"[1]20], E-Rok-grupo el Ribinsk, Eks-Sovetunio. Ilia situacio ŝajne bone evoluis, laŭ antaŭlastaj informoj...

Ni lasos paroli nian amikon Oleg Svirskij, kvankam li estas tre okupita; sed ni ankaŭ!



Aprile mi estis en Japanio por diskonigi "Kredon", EUROKKAn kaj kreatan centron de Vladimir Soroka (E-muzik-studio [2)6][3)xx]. Traveturinte Jokohama, Kamakura, Kavasaki kaj Tokio-n mi multe elpaŝis, prelegis, gitarkantis kaj uzis kasedojn, informante Japanojn pri E-muziko, E-Roko kaj ĉio proksima. Mi estis intervjuita fare de "La Orienta Revuo", kiu jam aperigis miajn respondojn en last-jara n-ro 6...

Ankaŭ mi konatiĝis kun kelkaj Japanoj, kiuj emas helpi al mi akiri muzikilojn. (NDLR: ni esperis kaj feliĉas ke tio sukcesis kaj ke vi estas "vere feliĉa kaj kontenta pri la vojaĝo"!)

Alie mi fine sukcesis trovi necesajn rimedojn por studie surbendigi nian albumon (NDLR: niaj legantoj eble ŝatus scii pli pri tio?) Dum somero ĉio devis esti farita kaj E-mondo konatiĝi kun nia kreajo. Tamen tiam mi ekposedos novan kapdoloron pri rapida elŝuldiĝo. Kiujn esperojn havi pri disvendado de niaj kasedoj, kiujn antaŭvidojn?

Malfeliĉe fine de aŭtuno, la unua Kredo disiĝis pro malsama penso pri la estonta agado: la unua starpunkto estis, ke necesas tute enprofundigi la koncertan agadon, ludante ĉion, por kio oni pagas. Male, de mia vidpunkto, ni devus fiksiĝi en laborejo (studio) kaj la liberan tempon dediĉi al ŝatata muzikstilo... Do tiel mi restis sola! Sed mi trovis helpantojn kun muzikiloj kaj ni kune nun ŝvitas super la albumo "Sizifa Konfeso", kiu malgraŭ ĉio aperos vintre. La nomo "Kredo" restis ankaŭ kun mi...

Nia albumo konsistas el kvin komponaĵoj: Orfa sorto - Sizifa konfeso - Paradokso - Tiel diris Zaratuŝtra kaj Vaga Hundo, Vagabondo - por entuta daŭro ĉirkaŭ kvardekkvar-minuta, kun plena tekstaro. Antaŭvidita prezo, ĉirkaŭ 65FF. Ankaŭ povas esti, se restos iom da mono, ke mi produktos kasedon kun miaj aŭtoraj gitarkantoj.

Sur la foto, eks-Kredanoj, de maldekstre : mi mem, A. Taŝlikov, T. Kukina, S. Kukin.

Amike via, Oleg Svirskij

ATENTU: lia adreso ŝanĝiĝis, vidu reton

Iom pri SOLO

Eduardo Vargas petas nin pri du etaj detaloj:

- Unue ke EUROKKA ricevu kaj okupiĝu pri mendoj de "**Kosmo Infano**", kion ni kompreneble akceptis (vidu katalogon de VinilKosmo - VKDG2).
- Due ke ni precizigu ke Solo ne estas bando! Efektive Solo faras ĉion sola: li kompponas, ludas kaj kantas mem siajn proprajn verkaĵojn. Escepte gitaristo aperas en la disko - kio ofte fariĝas en multegaj ĉiulingvaj produktaĵoj - temas pri amiko lia kiu kutime ludas en la surbendigejo (muzikstudio) sed Solo estas sola.

Tamen li jam havas repertuaron de sesdekdu kanzonojn en Esperanto, kiujn li surbendigos iom post iom. Jam dekkvin estas "en la skatolo" el kiuj kvin jam aperis en la diskego "**Kosmo Infano**". Aliaj devus baldaŭ aperi...

Krome **Solo** koncertas de temp' al tempo, sed ni ne scias pli pri tio, krom ke li koncertos en Bordozo por la SAT-Amikara kongreso dum Pasko kaj ke Eurokka starigas turneeton por li en Sud-Francio antaŭe.

Muziko kaj renaskiĝo de LITOVIO

Ankaŭ muziko por renaskiĝo de Litovio faris sian nemalgrandan rolon. Antaŭ 1987 kantoj pri patrujo, pri Litovio, pri ĝia estinteco, pri ĝia sendependeco, ne estis tre aprezataj de tiama registaro. Tiam patrujo estis ne Litovio sed Sovetio. Kompreneble simplaj litovoj tiel ne pensis.

En 1987, kiam komenciĝis renaskiĝo de Litovio, ankaŭ litovaj muzikistoj ne dormis. Tuj eksonis kantoj pri patrujo kaj libereco. Komenciĝis tiam tre famaj tielkonataj **rokmarŝoj** tra Litovio. En ili partoprenis la plej famaj litovaj ensembloj kaj gekantistoj. Ili vojaĝis tra Litovio, tra ĝiaj urboj, urbetoj, vilaĝoj, kaj kantis, vekis en popolo kaj junularo sentojn pri libereco. Kompreneble, ili kantis ankaŭ aliajn kantojn. El ĉiuj ensembloj la plej fama estis **Antis** (Anaso) kaj ĝia gvidanto Algirdas Kauspedas. En unu el la marŝoj preskaŭ kiel himno estis kanto ***«Krantas»*** (Bordo). En la kanto estas jenaj vortoj:

Stranga nia militistaro,
Sen armiloj
Kaj sole nur junularo.



Pri junularo, tio estas dubinda afero, sed pri militistaro kaj armiloj, tio estas vero. Malgranda Litovio ne povas batali kontraŭ tiu monstro Sovetio. Solaj armiloj estas la vero kaj kantoj.

Kaj kanto ĉiam akompanis la batalon. En 1989 dum *Baltios kelias* (La vojo de Baltio), kiam multege da homoj per manoj ligis tri ĉefurbojn, tiujn de Litovio, Latvio, kaj Estonio, ĉie en aero ŝvebis kantoj, kio mem estas eksterordinara, ĉar estis en tri lingvoj: litova, latva, estona. Ankaŭ dum la tragikaj eventoj ĉe la litovaj parlamento kaj televidcentro, muziko en malvarma vintra nokto akompanis senarmilajn gardantojn.

Nun estas tre ĝoje ke ni venkis. Kaj ankaŭ pri Esperanta rokmuziko, nun estas la unua hirundo. Rokensemblo **Rondo** eldonis diskon *Tau-2* (Por vi - 2) en kiu kantoj estas en lingvoj litova, angla, kaj unu esperanta: «Floroj por la amatino».

-- Drasutis Pockevicius

Rokanoj alien!

Antaŭ nelonge sur muzika firmamento de malproksima siberia urbo Tomsk, aperis esperante kantanta rok-bando "**ALIEn**". Du bravaj knaboj, Sergej Prjadkin kaj Dmitrij Nebajev, ambaŭ komencantoj en la lingvo, sed spertuloj en muziko, revas deiri de nuna "studia laboro" kaj prezenti sin al vasta publikaro. Kio rezultos el tio, montros tempo, sed ili firme kredas, ke ili kapablas malfermi "fermitan urbon Tomsk"!

Ilia moto: "Mem altnivele konstruu aparataron, mem altnivele verku, mem altnivele plenumu kantojn, nur tiam vi rajtos nomi vin.

J.P.



Dima kaj Sergeo

Pri la bando TORINO

La bando Torino (@2) kantas ne en Esperanto sed ja intencas tion: je la 16-a de septembro, la grupo ekkomencis sian esperantan lernadon en loka grupo E-asocio de Brasilia. La bandanoj jam esperantistigis siajn respektivajn nomojn. Nun ili estas: Joĉjo, Vilhelmo, Luĉjo, Ludoviko kaj Kaĉjo (Johano, Vilhelmo, Ludoviko 1, Ludoviko 2, Karolo). La lecionoj okazas lunde, merkrede, kaj vendrede (20-22-a vespere)

Anoncoj

Du Muzik-kajeroj

Antaŭ proksimume 10jaroj la situacio en Esperantaj rondoj estis tute alia. Ne nur ne ekzistis Rok-Gazet', sed se okazis balo la muziko konsistis el Anglalingvaj danckanzonoj. Tio multe kolerigis min.

Laŭ mi, unu el la plej gravaj difektoj de la movado estis la manko de la junula aĝgrupo. Mi kredis ke tiun oni povus altiri per pli da atento al popmuziko en la gazetaro kaj per Esperanta popmuziko dum la baloj. Tiucele mi kontribuis al Monato per serio da artikoloj pri famaj pop-steloj (The Beatles, Pink Floyd, Simon & Garfunkel, ktp) aldonante laŭsilabajn tradukojn de furor-kantoj. Kaj por plie Esperantigi balmuzikon mi verkis kelkajn muzikpecojn uzante poemojn de famaj Esperanto poetoj (kun ties permeso), kiujn oni povus ludigi ankaŭ al ne Esperantaj muzikgrupoj. Sed mi baldaŭ alfrontis la problemon ke oni nenion atingas sen kunlaboro de ankaŭ aliaj Esperantistoj.

Intertempe fondiĝis multaj (ndlr: !) Esperantaj popgrupoj. Sed eble la materialo ankoraŭ valoras iĝi konata (ndlr: certe!). Mi tiel verkis du muzikkajerojn, kiujn vi povas mendi ĉu ĉe EUROKKA, ĉu rekte al mi:

Rob Vetter
ZOUTEVEENSEWEG 25
NL-2636 EG SCHIPLUIDEN
NEDERLANDO



Ĝoju

En nord-okcidenta parto de Francio, ĵus aperis nova asocio: Ĝiaj celoj estas konatigi Esperanton kaj disvastigi ĝin.

Ĉiusemajnaj gvidkursoj, ĉiumonataj kunvenoj, ĉiutrimonataj renkontiĝoj estas proponitaj.

Ni ŝatas vian interesan Rok-Gazet'.

Petu informojn al:
G.E.M.
10 rue Albert Mézergues
F-72100 LE MANS



Roka Ŝtato 92 kaj Rok-Bazaro

okazos de la 5a ĝis la 8a de marto 92 en Montpellier (Francio). Amaso da koncertoj kaj standoj. Eurokka (Vinilkosmo, Rok-Gazet') prezentos sin en stando ĉe Rok-Bazaro.



Festivalo "RACINES"

(Radikoj)

Senpaga tuluza festivalo kun rok-, pop-, rege-, rep- kaj folk-muzikgrupoj el Eŭropo, Afriko kaj Ameriko. Ĝi okazos de la 2a ĝis la 4a de julio 92 en Toulouse-Le Mirail. Informoj pri programo ĉe Eŭrokka.

La Grande Fête des Humanos

(Festego de la homoidoj)

5a grandega eŭropa Rok-festivalo senpaga organizota de la "Humanoïdes délassés" (Forlasitaj homoidoj) okazos de la 10a ĝis la 12a de julio 92 en Saint-Ybars (Ariège - Francio). Informoj pri la programo ĉe "Humanoïdes délassés", Impasse des potiers, 09000 FOIX (Francio).



RADIOJ

RADIO HABANA CUBA

tre ĝojas pri agadoj de EUROKKA, sed tamen malkvietiĝas pri niaj Esperanto-programoj.(ili pravas, vidu pri FMR, ĉi sube) kaj memorigas ilian frandemon al ĉiaj E-novaĵoj

RADIO HAVANO
Esperanto fako
poŝtkesto 70-26
LA HABANA, CUBA



****

En la **Universitata Radio de KOSTARIKO** estas programo kiu temas pri Progresiva Muziko kaj malmulte disvastigita muziko. Ili volas fari programon pri la Esperanto-muziko, kaj, ĉar la celo de la programo estas ne nur elsendi sed ankaŭ informi, ĉiaj freŝaj informoj estos bonvenaj...Tiu programo estas neprofita kaj nacie fama.
Se estus vidbendoj pri E-muziko ankaŭ eblus elsendi ilin per la Universitata Televizio, kie estas la televizia versio de la elsendo pri progresiva muziko.
Skribu al:

Jorge Antonio Leoni,
Apartado 7603-1000,
San José, Costa-Rica.
América Central

****

Cecile Descubes produktis programon pri Esperanto, ilustrita per E-Rok-Muzikoj.
Tiu programo disaŭdiĝos de la 13a ĝis la 17a de aprilo 92 inter 10h30 kaj 11h en la franca radio stacio *France Culture* . Aŭskultu, gratulu, kaj petu pliajn Esperanto elsendojn ĉe:

France Culture,
F-75786 PARIS CEDEX 16



****

Jen interesa interŝanĝo-propono: **Mi povas surbendigi** francajn rokbandojn, ĉiuspecajn kaj ĉiuepokajn, ankaŭ alispecajn kasedojn kontraŭ E-musikmaterialo destinata al radio-elsendoj.
Skribu kaj proponu: respondo certas:

Guillaume LANIER
11 rue Alsace-Lorraine
F-69001 LYON

****

EL MAĤAĈKALA

Ĉefredaktoro de Dagestana respublika televido estas ankaŭ prezidanto de Dagestana Esperanto centro. Esperantisto ek de 1968 li nun iĝis estrarano de SEU. Verŝajne freŝaj informoj kaj bonaj vidbendoj interesos lin!

Abduraĥman Gaĝijeviĉ Junusov
Maĥaĉkala-12, ab/k 74,
367012 USSR, DSSR

****

RADIO FMR EN DANĜERO!

Radio FMR-89Mhz kiu elsendas la E-programon de EUROKKA estas minacita de malapero far de la aŭtoritatoj kaj de speciala komisiono por radio-televidoj ktp, por esti anstataŭigita de komerca stultiga nacia radioĉeno kiel estas jam tro multe da!
Sendu kuraĝigojn al:

Radio FMR,
Esperanto Redakcio
9 bis, av. Frédéric Estèbe
F-31200 TOULOUSE



ROKMUZIKA RETO

Sekve al plendoj de nia legantaro ni pensis ke plej bona solvo por estonte tion eviti estu ke niaj karaj korespondantoj menciu kiam ili ne deziras aperi en la reto aŭ ke ili ne deziras ke ni aperigu tuton aŭ parton de ilia letero en Rok-Gazet'. Antaŭdankon al ĉiuj.

****

Jen pliaj adresoj kaj informoj por la E-Rok-Muzik-Reto. En ĝi vi retrovos jam aperintajn en Rok'Gazet', nur kiam plio koncernas ilin. Tiam la signo @ sekvita de la n-ro de RG, antaŭos ilian nomon. Se ili aperis ekster la paĝoj de la Reto vi trovos menciite la numeron de Rok-Gazet' sekvitan de la taŭga paĝo, sub la formo X)pp . La signo & en la cetero de Rok'Gazet' resendas vin ĉi tien mem, en la Reton!

Antanas interesiĝas pri Esperanto-Muziko, ĉu pri roko?

ANTANAS GVILDYS
Jurbarkas, box-41
Lietuva 234430
LITHUANIA

****

Li provas instigi E-Rok-Muzikon en Rumanio, kaj estas prezidanto de la junulara E-movado en tiu lando.

DINCU MIHAIL-IULIAN
C.P. 9-38
RO-72100 BUCURESTI 9

****

E.K.S. ankaŭ interesiĝas pri E-Rok-Muziko kaj Rok-Gazet'...

Esperanto-Klubo-Surmonteta
GREEN LEVEL, STUDENTS UNION
UNIVERSITY OF CAPE TOWN
PRIVATE BAG
7700 RONDEBOSCH
REPUBLIC OF SOUTH AFRICA

****

ELNA fariĝis peranto de Rok-Gazet' por Usono kaj jam alsendis amason da abonantoj! Ni dankegas kaj gratulegas ilin. Krom tio ili organizas la nacian Esperanto kongreson de la 18a ĝis la 22a de julio 92 en Berkeley, Kalifornio...

ELNA,
P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
USONO

****

Vladlen ŝatas rokmuzikon kaj deziras korespondi pri tio kun iu el Francio.

GAKALENKO Vladlen
abonkesto 137
TIĤVIN - 6
LENINGR. OBL. 187500, RUSSIO

****

Georgo ŝajne ŝatas E-Rok-Muzikon kaj deziras kunlabori por Rok-Gazet'...

GEORGO TUJAKIN
33A-114,Kornejĉukstrato
SU-127543 MOSKVO

****

Li faris multajn sugestojn por plibonigi Rok-Gazet' kaj precipe la katalogon de VinilKosmo. Jen fervora kunlaboranto:

IÑAKI VELEZ
Ĉe Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena,7, 1 dcha
E-48005 BILBAO (HISPANIO)

****

Jorgos organizas staĝojn pri ĥorkantado per Esperanto en Arieĝo(Francio) de la 23/2 ĝis la 1/3/92. Aliaj staĝoj sekvos. Li ankaŭ aktivas en la E-Rok-Muzika Reto sed ne plu bicikle:

JORGOS
F-09120 ST-FELIX DE RIEUX-TORT

****

Leon verkas rok-kantojn en Esperanto, kun gitar-akordoj.

LEON KOLESNIKOV
GAGARINA 65-1
293720 DROGOBIĈ
UKRAINIO

****

MARKOS spektas rokkoncertojn en Hispanio kaj promesas raportojn.

MARKOS, ACACIAS 44,
E-28023, MADRID

****

Nakamura Makoto el Japanio, ne estas rokemulo kaj petas ke lia adreso kiu aperis en Rok-Gazet'2 ne plu estu uzata... Ni pardonpetas lin por la ĝeno kiun ni okazigis al li.

****

Oleg finfine eltrovis muzikilaron[1)20] kaj daŭrigas la rokbandon "KREDO", vidu artikoleton[3)xx], sed lia adreso ŝanĝiĝis:

Oleg SVIRSKIJ
Priborostroitelej 18-106
SU-152905 RIBINSK
RUSLANDO

****

Gratulu la unuan japanan E-pop-bandon: "La Mevo"!!!, ĉe:

ONO TAKAO
KAZIGAYA-TYO 43-8
SAKAE-KU
YOKOHAMA, 247 JAPAN



A T E N T O N!!
Nova adresso de SEU:
Sovetrespublikara Esperantista Unio
ab. ja. 111, ODINCOVO-6,
SU-143000, SOVETIO

****

Seán estas kontratenoro kaj muzik-recenzisto por diversaj revuoj, espereble estonte por Rok-Gazet', kaj kvankam li ne estas rokemulo, li jam partoprenis rok-operojn ks. vidu artikolon en ĉi numero [3)xx].

Seán OSBORNE
Hengeveldebrink 276
NL-7544 TW
ENSCHEDE
NEDERLANDO

****

SHI YONG NING interesiĝas pri Rok-Gazet' kaj studas en universitato kie sidas muzika fakultato. Multaj interesiĝas tie pri E-Rok-Muziko

Sro SUI YONG NING
Gongway, Shida
Shijiazhuang, CHINA

****

Por varbi, intervjui, gratuli ktp, la grupon Tutmonda Muziko, bonvolu kontakti ilian produktoron:

Gunther KOCH
HOHBERGERSTRASSE, 7
D-W-7037 MAGSTADT

****

Wang senespere serĉas rok-partiturojn por sia orkestro "Verda Fluganto". Antaŭdankante, li atendas vian helpon!

1 Wang Giong Wai
55-a Hao 799-a Long
Tiang Tong Lu
SHANG HAI 200085 ĈINIO


****

GRAVAJ ERAROJ englitiĝis en la adreso de Popov Aleksandr KUZMIĈ[2)11]:
SU-117571 MOSKVA, AMEM kaj por lia turmentejo:
SU-329412 Nikolajevskaja Oblastj, SNIGIRJOVSKIJ RAJON, S.CENTRALJNOJE, IN-316/5-5 Krome lia naskiĝdato estas: 02.08.1951 kaj ne 1971

****

Ludoviko Houguet anoncas ke, pro studado, lia E-rok-grupo ne plu aktivas provizore. Kuraĝigu lin!


Ludoviko HOUGUET
13, rue du Pradonnais
F-44350 GUERANDE



















KASED/DISK-DISTRIBUA KATALOGO
1992

EUROKKA
Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE
FRANCIO

MENDU ĉe
VINILKOSMO (EUROKKA)

Imprimerie Crystal Création - 31450 Deyme - Tél. 61 81 59 77